sed, pro pluraj pliaj taskoj liaj, tamen ne povis solvi la daŭran prokraston precipe en la koresponda laboro. En la momento kiam estis praktike ĝisdatigita la tuta librotenado dank' al streĉa vespera kromlaboro, la librotenisto grave malsaniĝis dum preskaŭ du monatoj. La nova prokrasto estiĝinta per tio, intertempe estas forigita. Dank' al librotena helpantino, S-ino Kilmer, kaj luita dua librotena maŝino (dum tria estas daŭre okupata por la kongresadministrado), la librotenado funkcias ekde januaro '64 plene kontentige. Post longa serĉado estis trovita kompetenta oficisto por la libroservo, S-ro Sudejugoslavdevena aŭstraliano. Tio ree liberigis S-ron Schmid, kiu ĝis tiam provizore prizorgis la libroservon, por liaj originaj taskoj de korespondado kaj administrado. La prokrasto intertempe estiĝinta en tiuj laboroj estas nun praktike forigita kaj multaj malnovaj aferoj solvitaj. Junulino, F-ino Bahnerh donas grandan helpon en multaj rutinaj laboroj kaj precipe transprenis grandan kvanton da tajplaboro. Estas trovita deĵoranto, S-ro Versteeg, multjara esperantisto, kiu okupiĝas pri enpakado. Tio signifas ke ne nur el vidpunkto de la laboro, sed ankaŭ el tiu de la lingvo kaj de la internacieco, la situacio de la oficistaro nun estas pli kontentiga ol iam antaŭe. Deĵoras nun, inkluzive de la direktorino, redaktoro kaj konstanta kongresa sekretario 12 personoj (el kiuj 2 duontage). En decembro 1963 la ĝenerala sekretario pasigis dek tagojn de sia libertempo en la C.O. por persone konstati la situacion kaj helpi al definitiva solvo de la malfacilaĵoj. Ni povas havi la fidon ke, malgraŭ daŭre ampleksiĝantaj laboroj, kun la nuna konsisto de la oficistaro ĉiuj taskoj povas esti kontentige plenumitaj. La C.O. ankaŭ ĉi tie sincere petas pardonon al ĉiuj, kiujn ĝi kontraŭvole seniluziigis en la pasinta jaro per manko de respondoj aŭ alimaniere.

(2) **Domo. Inaŭguro de la ĉambroj:** Siatempo, post aketo de la propra domo, estis lanĉita la ideo pri simbola donaco de ĉambroj per la fiksita sumo de 5000,— gld. (20.000 steloj). Unu jaron post la inaŭguro de la domo oni povis, okaze de la printempa Estrarkunsido 1963, inaŭguri dek tiamaniere donacitajn ĉambrojn. Ili nomiĝas, laŭ la donacintaj landoj, personoj aŭ instancoj, resp.

Kanado, Hamburgo, L. F. Kakebeeke, Llech-Walter, Monte-Carlo, Minnaja, Svedujo, Arabio, Broje kaj Nov-Zelando. Aparte bela fariĝis la Ĉambro Kanado, donacita de S-ino D. Henderson, kiu donaciis ankaŭ la tutan meblaron laŭ kanada stilo. La inaŭgura solenaĵo, je la 4-a de aprilo 1963, okazis en ĉeesto de la kanada ambasadoro, la brita ĝenerala konsulo, la sveda konsulo, germana ataŝeo, dum el la donacintoj aŭ en ilia nomo ĉeestis S-ro F. Epstein, S-ro R. Llech-Walter, F-ino Svensson kaj S-ro Åberg, S-ino Isbrucker. Detala raporto kun fotoj aperis en la maja numero 1963 de la revuo Esperanto.

(3) **Meblaro kaj maŝinoj:** Pro la plimultiĝo de laboro kaj oficistoj necesis aketi kelkajn pliajn oficejajn objektojn. Pro la sama kaŭzo, kaj ĉar la ekzistantaj malnoviĝas, sentiĝas bezono de plia skribmaŝino. La jam delonge serĉata fotokopia aparato ankoraŭ ne estas trovita. Tiu, kiu taŭgas, estas ege multekosta, dum aliaj ne estas kontentigaj, ĉar ili ne kopias ĉion (ekz. ne inkajn aŭ krajonajn skribaĵojn).

(4) **Membraro:** Laŭ la ciferoj de la momento (fino de februaro 1964) la membraro ampleksis en 1963 la jenajn nombrojn en la diversaj kategorioj: AM 26472, MJ 863, MA 5344, MS 478, Pat. 1, DM 554, HM 39, J-MJ 30, J-MA 172. Entute 33953 membroj en 84 landoj, kompare kun 32475 en 1962 el kiuj 7481 estis individuaj membroj (1962: 7169). El la individuaj membroj 892 estis MJ kaj do ricevis nur la jarlibron, dum 6588 apartenis al aliaj kategorioj, ricevante do krome la Revuon Esperanto. Detala klariga tabelo laŭlanda aperis en la marta numero 1964 de la revuo Esperanto, sed kun iom diferencaj ciferoj, ĉar post presigo de tiu numero ankoraŭ atingis la C.O. kelkaj kotizoj 1963.

(5) **Varba laboro:** La kresko de la individua membraro estas parte ŝuldata al varba kampanjo inter iamaj membroj, entreprenita pasintjare en kunligo kun la nova Laborplano. Ĝus presita estas nova faldfolio kun la nunaj kotizoj. Pere de ĝi la ĉefdelegitoj kaj perantoj entreprenos novan kampanjon inter la asociaj membroj.

Traktante dum la UK en Sofio la realigon de la Labor-



plano, la Komitato de UEA elektis tripersonan komisionon, kiu studu la membrisistemon de la Asocio kaj la staton en la unuopaj landoj, por ke ĝi faru proponojn pri eventuala plisimpligo de la membrisistemo, se tio konsiderinde plialtigos la membronombrojn ne kaŭzante malgajnon al UEA. La komisiono supozeble jam komencis sian (korespondan) laboron.

(6) **Delegitoj:** En la fino de 1963 la asocio havis entute 3380 delegitojn en ĉiuj kategorioj (3197 en 1962). El ili estis 1416 delegitoj, 257 vic-delegitoj, 1645 fakdelegitoj kaj 62 junulardelegitoj. La ŝanĝoj en la delegita reto estas regule raportataj en la revuo Esperanto. La ofte menciitaj vakaj lokoj estas grandparte kaŭzataj de translokiĝoj al aliaj urboj. Estus necese ke la ĉefdelegitoj kaj perantoj ankoraŭ pli atentu la baldaŭnan nomigon de aliaj taŭgaj personoj en tiuj lokoj.

(7) **Jarlibro:** La unua parto 1963 aperis kun 512 paĝoj en la unuaj tagoj de majo, la dua kun 136 paĝoj en la unuaj tagoj de decembro. En la unua parto, kelkaj rubrikoj i.a. tiu de la Esperanto-gazetaro, estis alimaniere aranĝitaj, kio, ŝajne, trovis ĝeneralan aprobon. Aliaj plibonigoj, i.a. la Librolisto, estas planataj. En la dua parto ne aperis terminaro, sed Esperanta Morsa Kodo, kompilita de Chaisnot, McMullen kaj Richardson.

(8) **Gazeto:** La C.O. daŭre prizorgis la administradon de la Revuo Esperanto. Pro la bonega kunordigado de la diversaj funkcioj rezulte de la surloka redaktado de D-ro Sadler, la Revuo povis aperi akurate komence de ĉiu monato (vd. ankaŭ V.A.).

Aparte menciinda estas la akiro de tutpaĝa reklamserio de Philips. Varbado de pliaj regulaĵoj reklamoj estus granda helpo. Kun malplezuro oni devas konstati ke ĝiaj ekspedkostoj fariĝas daŭre pli altaj, ne nur, ĉar ekde 1964 la tarifoj de afranko estas altigitaj, sed ankaŭ ĉar daŭre pli granda nombro da ricevantoj en difinitaj landoj devas ĝin ricevi per registrita poŝto por eviti perdisojn. Eĉ se la kostoj de registrado estas pagataj, la aparta traktado postulas pli da tempo kaj kaŭzas ekstrajn kostojn.

(9) **Monda Kulturo:** La unua konatiĝa numero de tiu revuo estis grandnombre dissendita, Regule alvenadas novaj abonoj, sed ankoraŭ la nombro ne estas kontentiga. (Vidu ankaŭ V. B).

(10) **Libroservo:** Ĝi funkcias tre kontentige kaj disponas pri sufiĉe grandaj provizoj. Rimarkinde estas ke la libroservon de UEA uzas ankaŭ multaj nemembroj en plej diversaj landoj.

(11) **Eldona Fakoj:** Nova eldonaĵo de UEA aperis ĝuste antaŭ la Kongreso en Sofio, la verko de J. P. Sartre, La Naŭzo, no. 3 en la serio Oriento-Okcidento, kiu estas eldonita en 1500 ekzempleroj. Sammomente aperis en Italujo la epokfara verko de Dante, Dia Komedio, en la traduko de Giovanni Peterlongo, (vidu X. 8) UEA ricevis la solrajton pri la vendado en la Esperanto-Movado, je la eksterordinare reduktita prezo de 36,— gld. kompare kun la normala prezo de 60,— gld. La ceteraj eldonaĵoj de UEA regule vendiĝas. Precipe dum la Kongreso en Sofio, kie orient-eŭropanoj povis aĉeti per levoj, la verkoj eldonitaj de UEA estis multnombro aĉetitaj.

(12) **Biblioteko Hodler:** La ordigado de la multaj libroj kaj periodaĵoj transportitaj el Genevo kontentige progresas, tiel ke verŝajne en 1965 ĝi estos finita. La kompilado de sistema kartaro espereble komenciĝos ankoraŭ en 1964. Nebezonataj duoblaĵoj el la Biblioteko estas aldonataj al la materialoj de la Universala Ekspozicio. La bibliotekisto havas kontaktojn kun pluraj aliaj bibliotekoj kaj kolektantoj por kompletigi la kolekton per interŝanĝoj, sed bedaŭrinde mankas informoj pri la libroj ankoraŭ restintaj en Genevo. Dum 1963 la manuskripta kolekto riĉiĝis per granda nombro da tradukoj el la rusa faritaj de S-ro D. Staritsky kaj donacitaj de lia vidvino, kaj per tre valoraj tradukoj de H. J. Bulthuis (1865-1945), inter kiuj la kompleta "Don Kihoto" de Cervantes. Ĝenerale la Esperanto-eldonistoj tre regule kaj akurate sendas siajn novajn eldonaĵojn por la Biblioteko, sed la Estraro forte alvokas al tiuj kelkaj, kiuj tion ne faras, kaj precipe al la eldonantoj de diversaj jarlibroj, kongresaj libroj, kaj

similaj, ke ili certigu la kompletecon de la arkivo. Provi- zora regularo por la uzo de la Biblioteko aperis en la maja "Esperanto", 1963, p. 86.

(13) **Internaciaj Konkursoj:** Venkis en 1963 Finnlando kaj Nov-Zelando. Estas aparte ĝojige ke unu el la ven- kintoj estas lando antipoda al la centro de la movado, kio montras ke la ligiteco al la asocio neniel influigas de la distancoj. Gratulinda estas ankaŭ Finnlando, kiu havas ne grandan, sed energie laborantan movadon.

#### B. SERVA CENTRO.

Administranto de la Serva Centro restis S-ro J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, Zürich 6/57, Svislando, kiu prizorgis en la daŭro de la pasinta jaro plurajn leterojn kaj sinturnojn, sed faris sian plej grandan kontribuon helpante al la Estrarano pri Financoj rilate la iompostio- man likvidon de la afero pri la posedaĵoj de UEA en Genevo. Nur post ricevo de raporto de la oficiala revizoro, en komenco de 1964, novaj paŝoj povis esti entreprenitaj.

### IV. FINANCOJ

(1) **Generalaj rimarkoj:** Kiam la Komitato en 1960 en Bruselo decidis ke por la Centra Oficejo estu serĉata nova domo, jam estis klare ke la laboroj tiom kreskis, ke la kelkaj ĉambroj en Eendrachtsweg 7 tute ne estis sufiĉaj. Tio fariĝis ankoraŭ ĉiam pli klara dum la postaj jaroj ĝis en 1962 la translokiĝo estis realigita. La jaro 1962, kiam la C.O. ankoraŭ parte estis ĉe la malnova adreso Eendrachtsweg 7, kaj parte en la nova kon- struaĵo, estis transira jaro. Nur nun, post finiĝo de la jaro 1963, oni povas bone rigardi kiom da laboro povas esti kaj estas farata en la nova C.O. Por doni ian impreson, kelkajn ciferojn. La envenintaj kaj elspezitaj sumoj en la kaso, la ĝirkontoj kaj la bankkontoj sumis ĉiuj kune entute preskaŭ 400.000,— gld. (Tiu sumo estis en la jaro 1960, por doni ekzemplon el la pasinteco, proks. 130.000,— gld.). La forsendo de poŝtaĵoj postulis — sen la kostoj de la ekspedo de jarlibro kaj revuo — sumon de 12.000,— gld. El tiuj du ciferoj jam estas klare ke

multa laboro estas farita en la C.O.

(2) **Ordinaraj en- kaj elspezoj:** Kiel montrite en la tabelo pri en- kaj elspezoj, la ordinaraj kostoj estis proksimume kovritaj per la ordinaraj elspezoj. La diferenco estas 4.200,— gld. aŭ 3%.

(3) **Membroj kaj kotizoj:** Kiel evidentiĝas el III (4), en 1963 la nombro de membroj kreskis, kaj la finaj nombroj estas pli altaj ol iam antaŭe. Speciale ĝojiga estas la kresko de la nombro de individuaj membroj de diversaj kategorioj. Bonvenigante la multajn novajn individuajn membrojn, ni esprimas dankon al tiuj, kiuj dum multaj jaroj restis fidelaj al UEA. Apartan dankon al la patrono kaj la MS, kiuj per siaj pliaj pagoj speciale subtenas la laboron de UEA.

(4) **Dumvivaj membroj:** En 1963 la nombro de la DM kreskis de 435 al 554. La novajn DM ni kore bonvenigas.

(5) **Kresko de la ordinaraj enspezoj:** Pro la pli granda nombro de membroj la enspezoj el kotizoj kreskis. Sed apud tio ankaŭ aliaj enspezoj, nome tiuj el la libroservo kaj el la licencpago de la kongreso bone kreskis. En 1962 la enspezoj de la C.O. el la kongresa licencpago estis nur iom pli ol 7000,— gld. En 1963 ili estis iom pli ol 18.000,— gld.

(6) **Libroservo:** Apud la vendo de propraj eldonoj por entute proks. 13.000,— gld. la libroservo vendis librojn je vendoprezo de entute 55.000,— gld. Tiu sumo en 1962 estis nur 30.000,— gld. Bonega progreso por tiu servo de UEA. Ĝi samtempe signifas ke venis plia intereso por aĉeti librojn ĉe UEA, sed verŝajne ankaŭ ke entute estis plia intereso por libroj en la Internacia Lingvo. Tio estas aparte ĝojiga fakto.

(7) **Bilanco:** La bilanco de UEA je la fino de la jaro 1963 montras ke UEA staras sur sana financa bazo. Rigardante ĝian debetan flankon, kaj speciale la unuan sumon, oni povus mistaksi la bonhavyon. Tio estas tamen grandparte ŝajno. Ĉar ne nur je la alia flanko de la

bilanco troviĝas la ŝuldo el hipoteke, la ŝuldo al la konthavantoj en la ŝparkonto-Tokio kaj aliaj, entute grandaj sumoj, sed estas ankaŭ tiel, ke je 1.1.1964 en la C.O. troviĝis jam mono por la elspezoj en 1964, kaj por ion bone entrepreni multa mono estas necesa.

(8) **Fondaĵoj:** Rigardante la sumojn, kiuj estas en la fondaĵoj, oni povas tuj konstati, ke la plej grava fondaĵo estas la "Propaganda Konto". El inter la aliaj fondaĵoj ni nomu nur ankoraŭ la Eldonan Fondaĵon, per kiu eblas preni iom da risko ĉe propraj eldonoj.

(9) **Kapitalo:** La Garantia Kapitalo ne ŝanĝiĝis. Ankaŭ la Fondaĵo Hodler restis preskaŭ sama. La Fondaĵo Domo denove bone kreskis. Envenis en 1963 por ĝi dua parto de la pagoj de S-ro A. M. Brya en Urbana (Ill. Usono), lasta parto de fam. Minnaja en Romo kaj la unua parto de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio por ĉambro "Novzelando"; krome, diversaj sumoj je po 50,— gld. aŭ pli, memorigitaj en la Ora Libro de la Domo. Vortoj de danko al la donacintoj ne devas ĉi tie forresti. La Laborkapitalo de UEA bonege kreskis en 1963. Ja envenis  $119 \times 300$ ,— gld. = 35.700,— gld. por dumviva membreco. Krom tio, heredaĵo de 288,04 gld. de nia bedaŭrata membro S-ro Charles Decorte el Blanduin, Belgujo.

(10) **Novaj kotizoj:** Traktante en Sofio la Buĝeton de UEA por 1964, la Komitato devis konstati, ke ne estis eble eviti plialtigon de la kotizoj, por certigi sendeficitan buĝeton adekvatan al la multspecaj kaj ampleksaj agadoj de la Asocio. Generale temas pri kreskoj je  $33\frac{1}{3}\%$ , nur la treege malalta kotizo AM duobliĝis. Plie, ankaŭ la kotizo J-MA duobliĝis, sed tio estas konsekvenco de la samtempe farita interkonsento kun TEJO, ke tiu organizo ricevu duonon de ĉiuj kotizoj J-MA kaj de la kotizoj de MA ĝis 25 jaroj, por ke tiuj junaj membroj ricevu krom la Revuo Esperanto ankaŭ la novan junularan gazeton Kontakto. La novaj kotizoj de la diversaj kategorioj do estas ekde la komenco de la jaro 1964: AM 0,50 gld., MA 20 gld., MJ 10 gld., MS 30 gld., JMA 15 gld., JMJ 5 gld., patronoj 200 gld., DM 400 gld.

(11) **Konkludo:** Rigardante la financojn de UEA, oni povas konkludi, ke dank' al la fidelaj malnovaj membroj, sed ankaŭ dank' al la ĉiujare alvenantaj novaj membroj ĝi estas nun sur la bona vojo. La Komitato, la Estraro kaj ĉiuj membroj esperas nur, ke ankoraŭ multaj homoj, kiuj scias la Internacian lingvon, sed ĝis nun ne fariĝis individuaj membroj, baldaŭ aliĝos kiel tiaj.

## V. PERIODAĴOJ

### A. REVUO ESPERANTO

(1) **Redaktoro:** Dum la laborjaro 1963/1964 restis kiel redaktoro D-ro Victor Sadler, kiu tiucele fariĝis oficisto en la C.O. en la fino de 1962. Pro la pli rekta kontakto inter redaktejo kaj presejo, la revuo povis aperi akurate komence de ĉiu monato.

(2) **Formato kaj aspekto:** Dum 1963 la ĝenerala prezo restis neŝanĝita, sed ekde januaro 1964 la engaĝigo ricevis novan karakteron kun la celo de pli granda individueco. Ekde februaro 1964 aperas pli larĝa titolo sur la kovrila paĝo por kompensi la paper-formaton, kiu por fotokovrilo estas iom eksternorma. La formato de la papero restis la sama kiel dum 1963.

(3) **Amplekso kaj enhavo:** Dum 1963 aperis 10 eldonoj de po 20 paĝoj plus kovrilo, kaj unu (decembra) de 24 paĝoj plus kovrilo. La suma amplekso de la jarkolekto 1963 (268 paĝoj) restis la sama kiel en 1962. Da paĝoj estis dediĉitaj al ĝeneralaj artikoloj 55, al oficialaj informoj 29, al artikoloj kaj raportoj pri la U.K. 26, al novaj libroj 24, al junularaj aferoj 21, al literaturo kaj arto 14, al rubrikoj "tra la mondo" kaj "laŭfake" 12, al CED 11, al kongresaj informoj 9, reklamoj kaj anoncoj sur internaj paĝoj 6, al radio 5, diversaj informoj 4, forumo 3, ŝako kaj esperantista vivo po 2, citaĵoj 1. Sur internaj paĝoj aperis 102 ilustraĵoj: iom malpli multaj ol en la antaŭa jaro, sed plej ofte kun pli granda formato, kaj ofte pli ol duonpaĝaj. Malkreskon en la nombro de ĝeneralaj artikoloj kompensis duoblo de la spaco dediĉita al junularaj aferoj. Tion kompreneble motivis

la Junulara Jaro. Same kreskis, lige kun la 2a Internacia Arta Festivalo kaj la elstara Sofia Kongreso, la spaco dediĉita al kongresaj artikoloj. Malkreskis la amplekso de la relative malgravaj kaj pli lokaj informoj, sed ties lokon transprenis ĉefe recenzoj de novaj libroj, kiuj estis eldonataj kun akcelita ritmo dum 1963. Por la jarkolekto 1963 estis ellaborita pli detala indekso ol en antaŭaj jaroj.

(4) **Tehnika prizorgo:** La tehnikan engaĝigon, korektaĉon kaj artaranĝon de la revuo prizorgis la redaktoro en interkonsiliĝo kun la presisto; la presado mem restis kiel ĝis nun en la manoj de la firmao Zwagers en Rotterdam.

## B. REVUO MONDA KULTURO

(1) **Redaktoro:** Dum 1963 daŭrigis la laboron William Auld, kiun anstataŭis ekde la kajero "vintro 1963/4" d-ro Andreo Albault, estrarano de UEA pri kulturaj aferoj. Laŭ la deziro de la Estraro, la koncepto pri la enhavo de la revuo estas plilarĝigita, kaj ampleksas nun ankaŭ tradukojn. En la lastaj kajeroj aperis materialoj leksikologiaj, filozofiaj, krom artikoloj pri teatro kaj pentrarto, kaj pli popularaj fikciaĵoj. D-ro Albault plue restas redaktoro dum 1964.

(2) **Formato kaj aspekto:** La formato restis senŝanĝa, nome sama kiel tiu de "Esperanto". La kovrila klišo, aliflanke, estas ŝanĝita ekde la printempa eldono de 1964.

(3) **Aplekso kaj enhavo:** Ankaŭ la amplekso restis senŝanĝa: entute 128 p. en kvar kajeroj, plus 16 kovrilaj paĝoj. Inter la verkistoj kontribuintaj dum 1963/4 troviĝas: Sen Rodin, William Auld, Sándor Szathmári, Kolomano Kalocsay, Victor Sadler, Juan Régulo Pérez, Emilija Lapenna, Hilda Dresen, Miyamoto Masao, Michel Duc Goninaz, Henri Vatré, Jean Ribillard, Edwin de Kock, Gaston Waringhien, Paul Lobut, Douglas Gregor, Julio Baghy, J. L. Mahé, Reto Rossetti kaj multaj aliaj.

(4) **Tehnika prizorgo kaj administrado:** La engaĝigon kaj korektaĉon de la tekstoj plejparte plenumis la redaktoro. La presado okazis ĉe Zwagers, Rotterdam. Kvankam ekde 1964 plialtiĝis konsiderinde la preskostoj en Nederlando, la abonprezo restis la sama: 15,— gld. (60 st.) jare. La revuo komencis firme establiĝi inter la konataj esperantaj periodaĵoj, kaj allogis al si konsiderindan nombron da abonantoj. Tamen necesas ankoraŭ pli da abonantoj por sukcesigi la revuon el financa vidpunkto.

## VI. KONGRESOJ

(1) **U.K. Sofio:** Per siaj pli ol 3400 aliĝintoj el kvardeko da landoj, la 48-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofio (3-10 Aŭg. 1963) estas la plej multnombra U.K. post la dua mondmilito kaj la dua en la historio de la Universalaj Kongresoj (la tria, se oni konsideras la neokazintan 10-an U.K. en 1914).

Elstara karakterizo de la 48-a U.K. estas la Dua Internacia Arta Festivalo, en kiu partoprenis solistoj kaj ensembloj el: Bulgarujo, Danlando, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Pollando, Skotlando kaj Sovetunio.

Pli detale pri la Arta Festivalo: 1. En la kadro de la Internacia Somera Universitato, kiu siavice estis en la kadro de la Festivalo, okazis 7 prelegoj, kiuj estis bone vizititaj, foje de pluraj centoj da kongresanoj. La rektoro de la ISU, Prof. Peevski, inaŭguris la Universitaton per parolado pri la atingaĵoj de la bulgara scienco kaj pri la valoro de la Internacia Lingvo por sciencaj celoj. La programo de la ISU aperis, kiel kutime, kiel aparta broŝuro en Esperanto kaj en nacia lingvo (t.e. bulgara). (Vidu X. 1). 2. Pluraj teatraĵoj estis prezentitaj de Bulgara Esperanto-Teatro kaj de Internacia Arta Teatro. La unua prezentis la konatan "Komedio de eraroj" de W. Shakespeare kaj la dua plurajn unuaktaĵojn: "Pri la malutilo de tabako" de A. P. Ĉeĥov, "La homa voĉo" de J. Cocteau, "La respektama p...." de J. P. Sartre,



"Hanibalo" de Vanča Kljaković kaj "Sen eliro" de Sartre. 3. Dum speciala Bulgara Arta Vespere elstaraj bulgaraj operkantistoj, dancistoj kaj folkloraj dancensemblo prezentis al la internacia publiko kelkajn aspektojn de la bulgara kultura vivo. 4. Belartaj, Oratora, Deklama kaj Fotografia Konkursoj okazis en la kadro de la Festivalo (vidu X. 2-3). 5. La konata itala pentristo E. Lo Martire aranĝis en la kadro de la Festivalo ekspozicion de grafikaĵoj kaj pentraĵoj. 82 fotoj de 19 aŭtoroj konsistigis alian ekspozicion. 6. Kulmino de la Arta Festivalo estis la Internacia Arta Vespere, en kies programo partoprenis la itala ĥoro "L. Gazzotti", la japanoj Deguchi kaj Umeda, la pola kaj bulgara kantistinoj Dabek kaj Jordanova, la sovetaj aktoro Rytjkov, aktoroj de IAT, la jugoslavia mimisto Konjhodžić, la jugoslavia dancensemblo "Ivo-Lola Ribar", la junulara ĥoro el Radom (Pollando), kaj la studenta okteto el Ljubljana (Jugoslavio).

La Unua Generala Kunveno de U.E.A. havis du partojn: la unua, kiun prezidis S-ro E. L. M. Wensing, akceptis la salutojn de la diversaj fakaj organizaĵoj reprezentitaj en la Kongreso; la dua, sub prezido de la TEJO-Prezidanto S-ro G. Becker, aŭdis raportojn pri "La Internacia Lingvo kaj la Nuntempa Junularo — okaze de la Junulara Jaro".

La Dua Generala Kunveno de U.E.A. laŭtradicie servis por diskuto pri la Estrara Raporto 1962/63. Prezidis S-ro H. Holmes, ĉeestis S-ro E. J. Woessink, Estrarano pri Financoj kaj F-ino M. H. Vermaas, Direktorino de la Centra Oficejo, kiuj povis doni ampleksajn klarigojn pri ĉiuj aspektoj de la Raporto. Ĉeestis ĉ. 250 personoj.

Dum la Kongreso okazis kunvenoj de ĉ. 30 fakaj asocioj inter kiuj TEJO, ISAE, IAJE, ESLI, IFEF, IGA, ILEI, ISAKE, LIBE, STELO, TEJA, UL, UMBA, IKUE, KELI, UUES, ILEF, MEM, ktp.

Notinde estas ke en pluraj kazoj la bulgaraj neesperantistaj fakuloj montris interesigon — eĉ foje sur ministeria nivelo.

Okazis la kutimaj oficiala inaŭguro (ĉeestis la Alta Protektanto de la Kongreso), interkona vespero, bankedo kaj balo. Plie la junuloj havis sian junularan vesperon.

La tuta kongresanaro estis akceptita oficiale de la Vic-Prezidanto de la ĉefurba Konsilantaro. Apartaj ak-

ceptoj estis rezervitaj por la Estraro de U.E.A. kaj por reprezentantoj de kelkaj fakaj asocioj.

La kongresejo de la 48-a U.K. estis la Sofia Stata Universitato.

Alta Protektanto de la Kongreso estis S-ro Georgi Trajkov, Unua Vicĉefministro de Bulgarujo. La Honoran Komitaton konsistigis elstaraj personecoj (16) el politika, kultura, scienca kaj religia kampoj.

Prezidis la Kongreson Prof. Hideo Yagi, Prezidanto de U.E.A.

Prezidanto de LKK estis S-ro Nikola Aleksiev kaj kiel Konstanta Kongresa Sekretario funkciis S-ro G. G. Pompilio.

Aliĝis 3472 personoj el 45 landoj.

Inter la publikaj eldonitaj de la 48-a U.K. mencienda estas la 8-paĝa Unua Bulteno, la 56-paĝa Dua Bulteno kaj la 180-paĝa Kongresa Libro. Tiu ĉi lasta estis kompletigita per 24-paĝa Suplemento.

(2) **Aranĝoj en kunligo kun la 48-a U.K.:** Dum la antaŭkongresa semajno okazis en Vraca (Bulgarujo) la 19-a Internacia Junulara Kongreso, kiun partoprenis pli ol 500 gejunuloj.

La 8-an Internacian Infanan Kongreseton partoprenis 62 infanoj el deko da landoj. La inaŭguro de ĝi allogis amason da ĵurnalistoj, fotistoj, k.a., same kiel la postaj publikaj prezentoj.

La seminarion por instruistoj laŭ la Cseh-metodo partoprenis 430 personoj.

Detalaj raportoj pri la 48-a Universala Kongreso de Esperanto aperis en la septembra numero de "Esperanto", 1963.

(3) **U.K. Den Haag:** La 49-a U.K. okazos en Den Haag (Nederlando) de la 1-a ĝis la 8-a de aŭgusto 1964. Alta Protektanto de la Kongreso estas Sia Moŝto Juliana, Reĝino de Nederlando.

Je kompilo de tiu ĉi raporto (15.3.1964) jam aliĝis al la 49-a U.K. 2135 personoj el 39 landoj. La Dua Oficiala Bulteno estas delonge presita kaj sendita al ĉiu aliĝinto.

Prezidanto de LKK estas Ing. J. R. G. Isbrucker. Kiel



Konstanta Kongresa Sekretario funkcias S-ro G. G. Pompilio.

Detalaj raportoj aperos en la septembra numero de "Esperanto", 1964.

(4) **U.K. Tokio:** La LKK de la 50-a U.K. en Tokio konstante laboras jam de pli ol unu jaro por la antaŭ-preparoj de la U.K.

Je kompilo de tiu ĉi raporto jam aliĝis al la 50-a U.K. 341 el 35 landoj.

Pri la flugkaravano aranĝata de U.E.A. la unuaj konkretaj informoj aperis en la decembra numero 1963 de "Esperanto". Pliaj detalaj informoj aperos en venontaj numeroj de la sama revuo.

(5) **Eŭropa Esperanto-Konferenco 1965.** La Estraro decidis doni la aŭspiciojn de UEA al la Eŭropa Esperanto-Konferenco, kiun aranĝos la Aŭstria Esperanto-Federacio du semajnojn antaŭ la UK en Tokio.

## VII. EKSTERAJ RILATOJ

### A. UNESKO

(1) **Konsultaj Rilatoj:** La pozicio restis neŝanĝita. La Asocio plue kunlaboris kun UNESKO sur la bazo de la konsultaj rilatoj en la kategorio B. La signifo de tiu arango kaj klarigoj pri diversaj kategorioj estis donitaj en la pasintjara raporto. Okazis plurfoje, ke en artikoloj, raportoj aŭ prelegoj la rilatoj de UEA kun UNESKO estis mis prezentitaj, kio kaŭzis iom da malfacilaĵoj ĉe la Sekretariato de UNESKO en Parizo. Tial estas necese, ke la personoj, kiuj skribas aŭ parolas pri la rilatoj de UEA kun UNESKO, unue bone informiĝu pri ilia karaktero laŭ la precizaj komunikoj publikigitaj en la Estraraj Raportoj kaj en la revuo "Esperanto". Plue, montriĝis ke unuopaj Esperanto-organizaĵoj kaj ankaŭ individuaj esperantistoj turnas sin rekte al la Sekretariato de UNESKO, ofte kun plene senbazaj asertoj aŭ nerealecraj proponoj, kio siavice malhelpas la glatan funkciadon de la konsultaj rilatoj inter UEA kaj UNESKO. Por eviti similajn erarojn en la estonteco, la Estraro insiste petas

observi la principon, ke ĉio koncerne la Internacian Lingvon ĉe la Sekretariato de UNESKO en Parizo estu farita tra la respondecaj funkciuloj de UEA, aŭ en interkonsento kun ili. Laŭ la Statuto, pri tiuj rilatoj estas ŝarĝita la ĝenerala sekretario, kiun en Parizo mem anstataŭas komitatano s-ro Jean Thierry.

(2) **Raporto pri kunlaborado:** La 26-an de septembro 1963 UEA sendis al la Sekretariato de UNESKO, laŭ ĝia peto, koncizan Raporton pri la Rilatoj de UEA kun UNESKO por la periodo 1958-1963. Malgraŭ la koncizeco, la Raporto tamen, pro la grandeco de UEA kaj la amplekso de la agadoj en tiuj 5 jaroj konsistis el 9 paĝoj. La Raporto donis informojn pri la oficiala titolo de la Asocio, sidejo, geografia etendiĝo, celoj kaj planoj, rilatoj kun U.N. kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, kontribuo al la agado de UNESKO, oficialaj komunikoj, partopreno en konferencoj kaj kelkaj aliaj formoj de kunlaborado. La Raporto aperis ankaŭ kiel dokumento de CED C/III/9 kaj, interalie, estis sendita al ĉiuj naciaj UNESKO-Komisionoj.

(3) **Partopreno en konferencoj:** Same kiel en la antaŭaj jaroj, la Asocio estis reprezentita en la konferencoj kaj kunsidoj de neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. D-ro Victor Sadler reprezentis la Asocion ĉe la kunsido de la Komitato de N.R.O. okazinta en Bruselo la 22-an kaj 23-an de aprilo 1963. Verŝajne pro miskompreno UEA ne ricevis inviton reprezentigi, ĉu rekte ĉu pere de TEJO, ĉe la Internacia Konferenco koncerne Junularon, okazonta en Grenoble fine de aŭgusto 1964.

(4) **Beograda Konferenco:** La Estraro invitis la Ĝeneralan Direktoron de UNESKO reprezentigi ĉe la Lerneja Konferenco en Beograd (vidu ĉap. IX). La Direktoro respondis, ke, bedaŭrinde li ne povos reprezentigi ĉe la Konferenco, sed esprimis la deziron ricevi informojn pri ĝia laboro. UEA sendis al li poste la dokumenton de CED B/IV/10, kiu enhavas la Raporton pri la laboro de la Konferenco. Estas menciinde, ke la Konferenco okazis sub la aŭspicio de la Jugoslaviana UNESKO-Komisiono.

(5) **Serio Oriento-Okcidento:** Krom "La Naŭzo" de Sartre, la luksega eldono de "Dia Komedio" de Dante (vidu ĉap. X. 8) aperis kiel plia verko en la Serio. Ĝi estis sendita, kun aparta dediĉo, ankaŭ al la Ĝenerala Direktoro de UNESKO, kiu, per sia letero de la 27-a de novembro esprimis tutkoran dankon kaj gratulon pro "tiu ĉi rimarkinda atingo, kiu honorigas vian Asocion".

(6) **Dokumentaj materialoj de CED:** Diversaj departementoj de UNESKO montris apartan interesiĝon pri la materialoj de la Scienca Konferenco en Kopenhago (1962) kaj Lerneja Konferenco de Beograd (1963). UEA liveris tiujn materialojn, kiuj aperis kiel dokumentoj de CED, en pluraj ekzempleroj al diversaj departementoj.

(7) **Index Translationum:** Informoj liveritaj de UEA en 1963 rilate Esperanto-tradukojn aperis en la Vol. 15 de tiu grava publikaĵo. Pliaj listoj estas regule sendataj kaj aperos en la sekvantaj volumoj.

(8) **UNESKO-Novaĵoj:** Aperis du pliaj numeroj de tiu bulteno, kiun redaktas s-ro E. Ockey. Entute ĝis nun aperis 28 numeroj. La Esperanta gazetaro kontentige plue utiligas tiun servon kaj, laŭ la informoj kiun posedas CED, ĝis nun entute aperis 515 informoj, ĉerpitaj el tiu bulteno, en diversaj Esperantaj gazetoj.

(9) **UNESKO-publikaĵoj en Esperanto:** UEA ankoraŭ posedas kvanton de la libreto "Oriento kaj Okcidento — Al Reciproka Kompreno?" de Georges Fradier. La Estraro varme rekomendas utiligon de tiu eldonaĵo, ĉar, post la elĉerpiĝo, estos eble publikigi pliajn eldonaĵojn de UNESKO en Esperanto.

(10) **Esperanto en UNESKO-Publikaĵoj:** Diversaj dokumentoj kaj publikaĵoj de UNESKO enhavis informojn aŭ menciojn pri Esperanto aŭ UEA. Aparte menciinda estas la publikigo de longa letero de Prof. I. Lapenna kun kelkaj reproduktaĵoj de Botticelli el la "Dia Komedio" en la junia numero de UNESKO Kuriero, 1963. La letero kaj la reproduktaĵoj ampleksis 3 paĝojn de tiu unuaranga revuo, eldonata en pluraj centmiloj da ekzem-

pleroj, en la lingvoj angla, franca, hispana, rusa, germana, araba, japana kaj itala. Pri la Esperanta eldono de la "Dia Komedio" informis ankaŭ *UNESCO Features*, aparta gazetara bulteno de UNESKO, sendata al ĉiuj pli gravaj gazetoj en la mondo. La revuo *Orient Occident* informis sufiĉe amplekse pri la UNESKO semajno en Frostavallen, pri la libro de Fradier en Esperanto kaj pri la serio Oriento-Okcidento. Entute, en CED ĝis nun estas registritaj 82 tiaspecaj informoj aperintaj en la UNESKO publikaĵoj aŭ dokumentoj ĝis la fino de januaro 1964.

## B. UNUIGINTAJ NACIOJ

(1) **Konsultaj rilatoj:** Rezulte de la konsultaj rilatoj kun UNESKO, UEA plue konservas la konsultajn rilatojn kun la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de U.N. La Asocio estis en kontakto kun la Sekretariato de U.N. en New York pere de la Ĝenerala Sekretario.

(2) **Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj:** La Sekretariato de U.N. kaj poste ankaŭ la Sekretariato de UNESKO turnis sin al ĉiuj NRO, inter kiuj ankaŭ la UEA, kun la peto kontribui al la celebrado de la 15-a datreveno de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj la 10-an de decembro 1963 konforme al la Rezolucio de la Ĝenerala Asembleo de U.N. de la 7-a de decembro 1962. UEA akceptis la inviton kaj donis detalajn sugestojn pri la celebrado al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj, informaj fakoj, redakcioj de la Esperantaj radio-elsendoj kaj gazetoj. En la novembro numero de "Esperanto" aperis resumo de la sugestoj, mallonga artikolo pri la signifo de la U.D. kaj la kompleta teksto de la Deklaracio. Poste la teksto de la Deklaracio kun la enkonduka artikolo aperis ankaŭ en formo de broŝuro. Detala Raporto pri la celebrado estis sendita al ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj kun kopio al la komitatoj de UEA la 17-an de februaro. Resumo de tiu raporto montras, ke entute okazis 122 prelegoj, 3 memorigoj per la radio, 14 artikoloj aperis en Esperanto kaj 147 en la naciaj lingvoj rezulte de la agado de la Esperanto-organizaĵoj aŭ unuopuloj, dum ĉ. 100 bondeziraj leteroj aŭ telegramoj estis senditaj al

(5) **Aliaj Organizaĵoj:** Bonaj rilatoj ekzistas inter UEA kaj diversaj internaciaj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun U.N. kaj UNESKO. La plimulto el ili regule ricevas la dokumentojn de CED kaj la bultenojn de la IGS kaj KGS.

(6) **Nobel-Premio:** Nombro da kvalifikitaj personoj el diversaj landoj faris denove proponon al la Nobel-Komitato en Oslo, ke UEA ricevu la Nobel-Premion por la paco por la jaro 1964. La rezultoj estos konataj fine de 1964.

(7) **Konkluda Rimarko:** Sendube, la rilatoj de UEA kun UNESKO, U.N. kaj diversaj aliaj interŝtataj kaj neregistaraj internaciaj organizaĵoj kaj instancoj estas kontentigaj kaj ili donas bonajn rezultojn. Tamen, la ĝisnunaj spertoj klare montras, kiel akcentite kaj antaŭvidite antaŭ pluraj jaroj, ke nur la establo kaj fortikiĝo de la rilatoj inter la landaj asocioj kaj la landaj kompetentaj instancoj povas rezultigi efektive grandformatajn atingojn. Ĉiu pli grava klopodo ĉe kiu ajn interŝtata instanco dependas en la lasta linio de la starpunkto de la Ŝtatoj-Membroj, kaj tiu starpunkto povas esti influata nur de niaj landaj organizaĵoj. La Estraro proponas, ke tiun aspekton de nia agado atente pritraktu kaj la Komitato kaj la landaj asocioj. Urĝe necesus, ke ĉiu landa asocio formu apartan komisionon el vere kompetentaj personoj por la rilatoj kun la aŭtoritatoj de sia lando, tute speciale kun la edukaj instancoj.

## VIII. INFORMADO

(1) **Landaj Informaj Fako:** En la julio-aŭgusta numero de "Esperanto" 1963 aperis la kutima ĉiujara tabela trarigardo pri la informa laboro dum la antaŭa jaro. El tiu l.a. evidentiĝis, ke el la landaj asocioj, kiuj faris la minimumon respondi al la demandaro kaj eĉ memorigaj leteroj de la I.F. de UEA, 20 fondis informan fakon laŭ la multjaraj insistaj instigoj de UEA, laste en la Dua Baza Laborplano. Kvankam tio jam signas etan progreson kompare de la antaŭa jaro (17), tamen estas tute nekontentiga stato, kiu pravigas plian alvokon al la landaj

asocioj. Da taskoj ekzistas sufiĉe (vd. la Principaron de Frostavallen, Jarlibro 1959 p. 186, kaj la ideojn de diversaj I.F.oj en la nomita artikolo en "Esperanto"), kaj la signifo de ilia taŭga plenumo por apogi la kampanjojn de UEA kaj la propran laboron sur aliaj kampoj estas tute evidenta.

(2) **Kunlaborantoj:** Ankaŭ dum la pasinta laborjaro la IF de UEA havis bonajn rilatojn kun sia reto da kunlaborantoj tra la mondo en landoj kun aŭ sen propra informa fako. Entute ricevis ĝiajn publikaĵojn je la fino de marto 1964 148 personoj el 39 landoj. La kunlaborantoj, same kiel la I.F.oj de la landaj asocioj, la membroj de TEJA kaj la komitatoj de UEA, regule ricevis ĉiujn cirkulerojn kaj bultenojn de la IF.

(3) **TEJA.** En la plej granda parto de la laborjaro 1963/64 la materialoj de la IF de UEA estis regule senditaj al 47 membroj de TEJA. Ĉar tio estas nur ono de la tuta membraro de tiu Asocio, ĉar dum la tempo pluraj estis forstrekigitaj pro neaktivado, la IF de UEA interrilatis kun TEJA kaj esperas kun ties helpo baldaŭ altigi la nombron de la ĵurnalistoj-ricevantoj. Tute certe tio helpos al pli bonaj eblecoj grandigi la atingopovon de nia informado, ĉar kompreneble la ĵurnalistoj troviĝas en aparte favoraj pozicioj tiurilate.

(4) **IGS.** Aperis 6 pliaj bultenoj de la Internacia Gazetara Servo, enhavante entute 36 novaĵojn pri la Internacia Lingvo kaj ĝia sukcesa praktikado. La IGS ĝis nun aperigis 134 bultenojn kun 576 novaĵoj. Kiel kutime la novaĵoj estis precipe kaj ofte tute bone utiligitaj tra la mondo en la nacilingva gazetaro pere de la IF.oj aŭ kunlaborantoj, sed ankaŭ Esperantaj revuoj kaj radiostacioj uzis la bultenojn. Bedaŭrinde grava obstaklo por la tre necesa laboro de la IGS estas la praktike plena pasivado de la landaj asocioj, respektive IF.oj dum 1963/64, rilate la sendadon de utiligeblaj novaĵoj por la bultenoj. La novaĵoj tial devis esti kribrigitaj el la Esperanta gazetaro kaj pro tio perdis — se ne plene sian utiligeblecon — do tamen sian aktualecon. Ekde 1964 la Redaktoro de "Esperanto", D-ro Sadler transprenis la

redaktadon. Por ke la I.G.S. kontentige plenumu sian rolon, estas necese, ke la landaj informaj fakoj kaj la landaj asocioj liveru al ĝi freŝdatajn materialojn.

(5) **UNESKO-novaĵoj:** Tiuj bultenoj ne estas destinitaj por la informado pri Esperanto (vd. VII, 8), sed tamen pli nerekte helpas ankaŭ al tiu, ĉar foje iliaj eroj aperas en neesperantaj revuoj kaj gazetoj. Aperis 2 pliaj numeroj.

(6) **Angla-franca IGS.** Aperis 4 tiaj bultenoj de entute 10 novaĵoj. Ĝis nun aperis 45 bultenoj kiujn regule ricevis 241 gazetoj kaj presagentoj de 55 diversaj landoj, precipe en Azio kaj Afriko, sed ankaŭ en aliaj landoj sen IF. Komprenoble, pro la kaŭzo menciita sub (4), ankaŭ tiu ĉi bulteno foje suferas de neaktualeco, kvankam ofte la novaĵoj ne estas ligitaj al difinitaj datoj. Redaktoro kiel la Esperanta IGS. En la francan tradukas de longa tempo F-ino Suzanne Minault, en la anglan D-ro Sadler.

(7) **Informado pri la Kongreso:** Pri la U.K. en Sofio estis aperigitaj informoj en la IGS antaŭ la Kongreso. Dum la kongresa semajno mem la KGS, kiun refoje gvidadis S-ro Marinko Ĝivoje, regule raportis per 8 ĉiutagaj bultenoj en suma amplekso de 38 paĝoj plus tre taŭgaj kovriloj. Ricevis la dokumentojn proksimume 200 landaj IF-oj aŭ kunlaborantoj tra la tuta mondo, ĉu permane en Sofio por rekta raportado, ĉu perpoŝte por posta utiligo por trarigardaj artikoloj. La bulgara branĉo estis gvidata de la profesia ĵurnalista, S-ro Ivan Kere-miĉiev-Esperov, kiu kolektis ĉirkaŭ sin plurajn ĵurnalistojn, informis dum la antaŭkongresa jaro la tre informemman bulgaran gazetaron per bultenoj kaj bone vizitita gazetara konferenco. Duan tian konfernecon tuj antaŭ la Kongreso kaj en la ĉeesto de la Estraro de UEA, vizitis 40 ĵurnalistoj de la gazetaro, de la telegrafagentejo kaj televido, kaj ĝin malfermis kiel Prezidanto la Vic-Prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Ĵurnalistoj Ilija Kjuljovski. Dum la Kongreso estis dissenditaj bulgarlingvaj bultenoj de 29 paĝoj al la gazetaro, dum la polan gazetaron informis pollingva unupaĝa bulteno. La KGS daŭre sendis al Pola Radio novaĵojn por ties ĉiutagaj elsendoj. Ĉio-ĉi kondiĉis grandan interesigon precipe

kompreneble en la bulgara gazetaro.

Por fari klopodon disvastigi la novaĵojn pri la U.K. en Sofio per la plej influhavaj gazetoj de Okcidenta Eŭropo (pri Orienta Eŭropo zorgis la LKK) kaj por altiri la rigardon de tiuj gazetoj, kiuj dediĉas ĉiam pli da kolumnoj al la problemoj de internacia lingvo, al la praktikata solvo de tiu problemoj, kiun prezentas Esperanto, la IF de UEA sendis al 18 tiaj gazetoj de 9 landoj specialan leteron, per kiu ĝi invitis ilin sendi raportistojn al la Kongreso en Sofio. Al la letero estis aldonitaj la Kongresa Libro kun du nacilingvaj trarigardoj pri la Kongreso kaj ĝia programo, kaj fine la Dok. A/II/1-2 de CED pri la Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj. Ĉiuj leteroj estis tajpitaj en la koncernaj naciaj lingvoj kaj subskribitaj de la Ĝenerala Sekretario kaj la Estraro pri Informado. Per la cirk. let. 65/1963 la IF-oj estis informitaj pri la plena teksto kaj alvokitaj fari mem similajn paŝojn rilate al aliaj gazetoj. Ni informiĝis, ke almenaŭ la grava franca "Le Figaro" sendis ĵurnaliston, kiu raportis tre objekte. Sendube la efiko estos pli granda en Hago.

(8) **Agado en neesperantistaj kongresoj:** La CO daŭre informadis, konforme al la siatempa Komitata decido, la landajn asociojn pri la okazantaj internaciaj kongresoj kaj konferencoj en la respektivaj landoj, por doni al ili la okazon informadi la partoprenantojn ekzemple per la seslingva flugfolio de UEA. Por ke ankaŭ la fakaj organizaĵoj povu taŭge ekagi tiusence, laŭ la peto esprimita en la Komitato en Sofio, nun ankaŭ ili estas informataj pri la respektivaj fakaj kongresoj. Tio espereble rezultigas plian penetron en fakajn mediojn, unu el la plej gravaj celoj de la nuntempa movado.

(9) **Agado en universitatoj:** UEA daŭrigis — kun la helpo de STELO, la studenta ligo — distribuadi la flugfolion por universitatoj, kaj ankaŭ la broŝuron menciitan sub (11). Estas utile atentigi la landajn IF-ojn pri la taŭgeco de tiu lasta broŝuro en ĉiuj urboj, kie troviĝas afrikaj studentoj. En multaj lokoj troviĝas trege agemaj studentaj societoj, kiuj modele aplikadas la Principaron de Frostavallen en sia informado pri



Esperanto kaj kreis bonan bazon por la plua vastigo de Esperanto en akademiaj medioj.

(10) **Agado en Azio:** Dum 1963/64 la Asocio ne sendis pliajn agantojn al Azio, sed daŭrigis sian subtenon al la laboro de S-ino M. Haudebine en Hindujo. En 1963 S-ino Haudebine gvidis plurajn kursojn en Delhio, kaj, pere de la nove fondita Hinda Instituto de Esperanto, organizis la unuan elementan ekzamenon por la lernintoj. Si ankaŭ faris prelegvojaĝon en la sudaj ŝtatoj de Hindujo, kie ŝi vizitis la urbojn Ernakulam, Allepey, Trivandrum kaj Madras kaj donis intervjuon por la radio-stacio de Trivandrum. La multaj rezultintaj informpetoj instigis ŝin kompletigi korespondan kurson speciale adaptitan al hindaj cirkonstancoj.

En la orienta parto de la sama lando pludaŭris la revigligo rezultinta el la pli fruaj vizitoj de S-roj Milojević kaj Sadler. Al la konata esperantisto en la Universitato Ŝantiniketan, S-ro L. Sinha, aliĝis nun pli juna instruisto, S-ro Albani Halder, kiuj kune kolektis monon kaj librojn kaj aĉetis teron apud la Universitato por fondota Bengala Esperanto-Instituto. Aperis la unua verko pri Esperanto iam eldonita en hinda lingvo: nome, la "Esperanto-andolon" (Esperanto-movado), 70-paĝa broŝuro de L. Sinha, en la bengala.

En Cejlono kaj Nepalo la movado stagnis dum la pasinta jaro pro manko de sperta gvidanto, kvankam en Cejlono aperis la unua eldono de "Bulteno de C.E.S." kaj pludaŭras koresponda kurso gvidata de D-ro C. H. Dharmatilake. Esperanta-sinhala vortareto fine aperis.

En Kuvajto unu lingvo-lernejo "Polyglot Language School" eldonis arablingvajn informilojn pri la Internacia Lingvo.

En Mongolujo parte revekigis interesiĝo, sed mankas detalaj informoj.

(Vidu ankaŭ raportojn de landaj asocioj en la aldono.)

(11) **Agado en Afriko:** La plej grava paŝo de 1963/64 estis verŝajne la aperigo de la broŝuro de Tibor Sekelj, "La Internacia Lingvo Esperanto — Komuna Lingvo por Afriko, Komuna Lingvo por la Mondo" ankaŭ en la araba lingvo. En tiu lingvo eldonis ĝin S-ro Charles Thollet, kiu

kun F-ino Elsie Parson planas komenci novajn kursojn en Maroko. La arablingva eldono, same kiel la pli frue aperintaj angla kaj franca eldonoj, estas havebla de la C.O. de UEA kontraŭ po 0,15 gld. por ĉiu ekzemplero. El la 5000 ekzempleroj presitaj en la angla, estas distribuitaj ĝis marto 1964 2500 ekz.; de la 5000 presitaj en la franca estas dissenditaj preskaŭ 4000 ekz. Estas tre dezirinde, ke oni rapide utiligu la restantan kvanton, kiel en Afriko mem, tiel ankaŭ en aliaj kontinentoj inter afrikaj studentoj. Tiamaniere ebligis plej baldaŭ fari ankoraŭ pli efikan kaj ĝisdatigitan tekston en nova eldono.

La "Karavano de Amikeco tra Afriko", kiu sukcesis vekii interesiĝon per artikoloj, prelegoj, radio-elsendoj kaj intervjuoj en Egiptujo, Etiopio, Sudano, Somalio, Kenjo, Ugando kaj Tanganjiko, finiĝis iom antaŭ la Sofia Kongreso, en kiu ĝia gvidanto Tibor Sekelj faris detalan raporton. Artikolo pri la dua parto de la vojaĝo aperis en "Esperanto" de decembro 1963.

En la sama regiono (Orienta Afriko), intertempe, laboris S-ro Mark Starr, kiu sukcesis aperigi leterojn en ĵurnaloj de Tanganjiko, Kenjo kaj Ugando, kaj longan artikolon en la revuo "Spearhead".

En Okcidenta Afriko S-ino Potin (Senegalio) sukcesis kun pluraj ĵurnalartikoloj, S-ro Savir (Mali) daŭrigas siajn Cseh-metodajn kursojn, kaj S-ro Braet (Kongolando) komencis seriozan kaj sisteman informan agadon.

S-ro Wensing, vicprezidanto de UEA, dum rapidaj vizitoj al Nigerio kaj Etiopio povis diskutigi la lingvon en pluraj universitatoj kaj ministerioj.

(Vidu ankaŭ raportojn de landaj asocioj en la aldono.)

(12) **Olimpiaj Ludoj:** Prof. D-ro Hideo Yagi daŭrigis sian laboron pri informado pri Esperanto okaze de la Olimpiaj Ludoj en Tokio 1964, kaj tiucele kunlaboras kun la Japana Esperanto-Instituto, kiu eldonis, komence de 1964, 38-paĝan frazaron Esperanto-japanan en taŭga poŝformato kun nombro da ĉiutagaj utilaj vortoj kaj frazoj krom listo da sportaj vortoj en la du lingvoj (la japana en fonetika transskribo). Ĝi prezentas bonan helpilon por vizitantoj al la Ludoj kaj al la U.K. 1965, sed ankaŭ bazon de informaga agado inter nacilingvaj sportistoj en la diversaj landoj. Estas malfermitaj kursoj en pli ol 20 urboj, kaj



por sportistoj kaj por ĝenerala publiko. Plie oni intencas, laŭeble aranĝi Akceptejon ĉe la Informejo de la Stadiono.

(13) **Afiŝoj:** La internacia afiŝo, kiun eldonis UEA post la siatempa konkurso, kaj kiu estas tre taŭga pro la spaco disponebla por nacilingvaj tekstoj, regule vendiĝas, sed tute ne laŭ ĝia merito. Sendube multaj landaj asocioj ne donis sufiĉan atenton al tiu ĉi helpilo en sia laboro. Aĉetebla ĉe la CO (vidu anoncojn en "Esperanto").

(14) **Resumaj ciferoj pri informado:** Tabela trarigardo aperis en la julio-aŭgusta numero de la Revuo Esperanto. Ĉi tie estas donitaj nur la resumaj ciferoj, kaj parenteze troviĝas, por ebligi komparon, la ciferoj de la jaro 1962:

Laŭ la 31 (33) respondoj de landaj asocioj aŭ kunlaborantoj, en 1963 aperis 4472 (4497) artikoloj kaj 11174 (11595) informoj en nacilingvaj gazetoj. Ĉe 931 (1753) prelegoj pri Esperanto ĉeestis 56449 (94348) personoj. Okazis 827 (949) nacilingvaj radio- aŭ TV-prelegoj. 204 (355) ekspoziciojn vizitis 431030 (392404) personoj. Estis disdonitaj 433011 (463660) informiloj.

(15) **Kunveno 1963:** Ĉar ne estis esprimita deziro flanke de la landaj asocioj, kaj ĉar la Kongreson en Sofio ne povis ĉeesti la Estrarano pri Informado, ne estis okazigita kunveno de la reprezentantoj de la IF-oj dum la Universala Kongreso.

(16) **Kunveno 1964:** Tutcerte okazos tia kunveno de la informaj fakoj dum la Haga U.K. tiun ĉi jaron. La Haga kongreso entute dediĉos al la informa laboro gravan atenton, donante al unu el siaj sekcioj la temon "Aplikado de Modernaj Metodoj en la Informado pri Esperanto".

(17) **Cirkuleroj:** La kontakto inter la IF de UEA kaj la landaj IF-oj kaj kunlaborantoj devis, do, okazi ĉefe per korespondado kaj cirkuleroj. Estis dissenditaj 2 novaj cirkuleroj pri 4 diversaj punktoj de agado.

## IX. LERNEJOJ

(1) **Lerneja Konferenco en Beograd:** Interkonsente kun

la Estraro de UEA, JEL organizis en Beograd Internacian Konferencon de Lernejoj en kiuj Esperanto estas Instruata. Ĝi okazis de la 28-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto sub la aŭspicio de Jugoslavia Nacia UNESKO-Komisiono. La Konferencon partoprenis 214 instruistoj kaj edukistoj el 20 landoj, 46 observantoj kaj 22 gelernantoj en la aĝo de 8-14 jaroj el 5 landoj. La gelernantoj havis apartan programon. La oficialaj reprezentantoj estis s-ro R. Andjelić en la nomo de la Jugoslavia UNESKO-Komisiono, s-ino E. Nielsen en la nomo de la Dana Ministro de Edukado, Prof. E. Farkas en la nomo de la Hungara Ministro de Edukado kaj Kulturo, s-ro L. Schmidt en la nomo de la Aŭstria UNESKO-Komisiono. Al la Konferenco estis prezentitaj entute 20 enkondukaj raportoj rilatantaj al la 5 ĉeftemoj de la Konferenco: Kontribuo de Esperanto al la Generalilaj Edukado kaj Instruado, Ĝisnunaj Organizaj Spertoj Rilate al la Enkonduko de Esperanto en la Lernejojn, Plibonigo kaj Modernigo de Esperanto-Instruado, Liberaj Aktivecoj de Gelernantoj Lernantaj Esperanton, Aktualaj Organizaj Problemoj. Ĉiuj raportoj estis publikigitaj en formo de 116-paĝa libro jam antaŭ la Konferenco, kio faciligis ĝian laboron en la Pleno kaj en la 5 Komisionoj. Unu el la bazaj dokumentoj estis la Raporto de CED pri la stato de la instruado de la Internacia Lingvo en la lernejoj en la lerneja jaro 1962/1963 (vidu la Raporton de CED). La Konferenco akceptis plurajn rezoluciojn, kies tekstoj aperis en la septembra kaj oktobra numeroj de "Esperanto" (pp. 145 kaj 163). La Konferenco estis sur alta faka nivelo kaj povas esti konsiderata kiel decida paŝo antaŭen sur la vojo al la vastiĝo de la instruado de Esperanto en la lernejoj.

(2) **Konsulta Komisiono pri Lernejoj:** Plenumante la deziresprimon de la Rezolucio Adresita al UEA de la Beograda Konferenco kaj la respektivan decidon de la Komitato de UEA, la Estraro de UEA nomis apartan komisionon kun la nomo Konsulta Komisiono pri Lernejoj. Ĝi konsistas el Prof. D-ro Ivo Lapenna kaj sinjoroj E. Malmgren, R. H. M. Markarian kaj P. Zlatnar, kaj ĝia tasko estas kunordigi la tutan agadon en la lernejoj. Konforme al la menciita Rezolucio, la Komisiono tuj establis kontaktojn kun ILEI, TEJO, GEV kaj aliaj

organizaĵoj kaj instancoj, kiuj en kiu ajn senco laboras en la sfero de lernejoj. Ĝi aparte petis la apogon de ILEI. La unua kunsido de la Komisiono okazis en la Oficejo de CED, Londono, la 1-an de februaro 1964 dum la tuta tago. Ĝi detale pritraktis la plej taŭgajn formojn por la realigo de la decidoj de la Beograda Konferenco, selektis la plej urĝajn taskojn, faris tiurilate konformajn decidojn kaj planis la agadon ankaŭ por la pli malproksima estonteco. Dekpaĝa protokolo kun la detaloj pri la laboro de la kunsido estis sendita al ĉiuj landaj asocioj, ILEI kaj TEJO, redakcioj de "Planteto" kaj "Homo kaj Kosmo", "Grajnoj en Vento", komitatoj de UEA, komisiitoj kaj kunlaborantoj per la cirk. let. KKL/20-1964 de la 8-a de februaro 1964. Koncizaj informoj aperis en la Lerneja Bulteno n-ro 1, publikigita en la marta numero de "Esperanto". Por ke la Komisiono povu funkcii kiel eble plej glate, la membroj interkonsiliĝos nur pri la plej gravaj demandoj skribe aŭ, de tempo al tempo, en kunsidoj, sed ĉiu el ili plenumos memstare la laboron laŭ la jenaj ĉefaj branĉoj de agado: Prof. Lapenna plue prizorgos la rilatojn kun interŝtataj organizaĵoj kaj la agadon por la vastigo de instruado de Esperanto en la lernejoj; s-ro E. Malmgren prizorgos la rilatojn kun fakaj instruistaj neesperantistaj organizaĵoj; s-ro R. H. M. Markarian okupiĝos pri ĉiuj pedagogiaj demandoj; s-ro P. Zlatnar transprenis ĉiujn organizaĵajn demandojn, precipe la reciprokan kontaktigon de lernejoj, la respondecon por organizo de internaciaj lernejoj kaj konferencoj kaj renkontiĝoj.

(3) **Urĝaj Taskoj:** La KKL trovis, ke la tuta laboro estas dividebla je du ĉefaj grupoj: la plej urĝaj taskoj, tuj plenumindaj, kaj la planado de la estonta agado. La ĉefaj decidoj koncerne la plej urĝajn taskojn estas: (i) pro manko de pedagogia revuo la Komisiono establos la necesajn kontaktojn kun la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata per aparta informilo "Lerneja Bulteno", kiu estos presita en "Esperanto" kaj poste kiel represaĵo sendita al ĉiuj lernejoj, kiuj aliĝos al la "Interlerneja Interkonsento"; (ii) por helpi al la infanoj akiri Esperantan literaturon, partopreni en internaciaj renkontiĝoj kaj entute por kuraĝigi la infanojn en la lernado de la

lingvo, la Komisiono proponis al la Estraro de UEA establi apartan fondaĵon sub la nomo "Fondaĵo Lernejoj"; (iii) en la "Lerneja Bulteno" regule aperados konsiloj rilate la plibonigon de la instruado de la lingvo en la lernejoj; aperos ankaŭ listo de legolibroj klasigitaj laŭ la facileco; (iv) "Grajnoj en Vento", al kiu UEA donis subvencio de 500 gld, meritas plenan apogon kaj la Komisiono alvokis la geinstruistojn partopreni en tiu elstara eduka laboro (oni bv. sin turni rekte al la organizanto s-ro Marcel Erbetta, Rue des Pins 66, Bienne-Biel 7, Svislando); (v) la Komisiono varme rekomendis al la geinstruistoj de Esperanto abonigi siajn gelernantojn al infanaj kaj junularaj periodaĵoj: "Planteto", ilustrita gazeto, Pispalanharju 13, Pispala-Tampere, Finnlando; "Homo kaj Kosmo", revuo tre taŭga por iom pli aĝaj gejunuloj, Astronomia Observatorio, Zagreb, Opatička 22, Jugoslavio; "Kontakto", taŭga por gestudentoj, ĝenerale gejunuloj kaj geinstruistoj, eldonata de TEJO kaj abonebla ĉe UEA; (vi) la Komisiono insiste rekomendis al ĉiuj Esperanto-instruistoj en la lernejoj aliĝi al la "Interlerneja Interkonsento" ("Esperanto", oktobro 1963, p. 163), kies teksto kun aliĝilo kaj klariga cirkulero estis senditaj fine de februaro al ĉiuj lernejoj, en kiuj oni instruas Esperanton, kaj al ĉiuj instruistoj, kiuj partoprenis la Beogradan Konferencon; (vii) konsiderante, ke Interlerneja korespondado havas unuarangan gravecon ne nur por kuraĝigi la lernadon, sed ankaŭ por evoluigi ĉe la gelernantoj senton de internacia interkompreniĝo, la Komisiono rekomendis utiligi multe pli vaste la servon de UEA "Koresponda Servo Mondskala" (vidu la Jarlibron, 1963, p. 118), la rondojn "Grajnoj en Vento" kaj la sistemon "Geonkloj Esperantistaj" kiu celas kunligi la gelernantojn kun plenaĝuloj per korespondado kaj kies administranto estas s-ro J. H. Sullivan, 3, Berwick Avenue, Urmston, Manchester, Britujo; (viii) TEJO prizorgos, interkonsente kun la koncerna instruisto, lernejan Esperanto-grupon en ĉiu lernejo, en kiu por tio ekzistas ebleco; la Komisiono siavice rekomendis al Esperanto-instruistoj formi lernejajn Esperanto-grupojn kaj, se iel eble ligi ilin al TEJO. Evidente, la realigo de la supraj sugestoj postulas la kunlaboradon de ĉiuj agantoj sur tiu ĉi grava kampo, sed unuavice de la lernejoj, en kiuj Esperanto

estas instruata, respektive de la instruistoj de Esperanto en tiuj lernejoj. La Komisiono certe plenumos sian devon, sed la sukceso de la agado ne dependas nur de ĝi.

(4) **Lerneja Konferenco 1965:** La Komisiono decidis, ke, se iel eble, la sekvanta Lerneja Konferenco, esence laŭ la modelo de la Beograda, okazu en Londono, de la 21-a ĝis la 28-a de aŭgusto 1965. La preparlaboroj jam komenciĝis.

## X. SPECIALAJ KULTURAJ AKTIVECOJ

(1) **I.S.U.:** La Internacia Somera Universitato kunvenis por sia 16-a sesio en Sofio (3-10 Aŭg. 1963). La Rektoro estis Prof. D-ro Inĝ. Vasil PEEVSKI, Profesoro pri Geodezio, Vicrektoro de la Altlernejoj por inĝenieroj-konstruistoj, arkitektoj kaj inĝenieroj-geodeziistoj, Prezidanto de la Organizaĵo de la Bulgaraj geodeziistoj. D-ro V. SADLER kiu estis nomita de la Estraro printempe 1963 funkciis kiel Sekretario. Prelegis: D-ro V. SADLER pri "Ĉu Kulturoj aŭ kulturo?"; Prof. Gaston WARINGHIEN "La ellaborado de Esperanta Leksikologio"; Prof. Petr DINEKOV: "Evoluo de la Bulgara Literaturo"; F-ino Mag. Marjorie BOULTON "Metaforoj, kliŝoj kaj slangoj"; Prof. D-ro Stojan ĜUĜEV: "La muziko de la lingvo"; D-ro Tadeusz WÓJCZIK: "La racia muzikskribo"; S-ro Boris KOLKER: "Rezultoj de Permaŝina traduko el la rusa lingvo en Esperanton".

(2) **Belartaj Konkursoj:** La plenaj rezultoj estas anoncitaj en "Esperanto" de Septembro 1963 (p. 150). Unuaj premioj en la branĉoj: Originala Poezio: Masao MIYAMOTO; Tradukita Poezio: Julius BALBIN; Originala Prozo: SEN RODIN; Originala Dramo: Emilija LAPENNA; Premio Nova Talento: Wouter PILGER. La libro de la Jaro: "Otello" de Shakespeare en traduko de Reto ROSSETTI.

La Juĝkomisiono konsistis el W. AULD, Miloš LUKAŠ, G. WARINGHIEN, por Poezio; kaj por Prozo: R. BERNARD, J. H. ROSBACH kaj W. AULD, kiun postsekvis fine de 1963 S-ro Edw. P. OCKEY.

(3) **Oratora Konkurso:** Sukcesa konkurso partoprenita de naŭ gejunuloj el naŭ landoj. Juĝis S-ino E. LAPENNA, S-roj G. BECKER kaj C. MINNAJA. S-ro Stanisław SWISTAK el Pollando ricevis la unuan premion; dua premio: S-ro Kyotaro DEGUCHI, Japanujo; tria premio: Diccon MASTERMAN, Britujo.

(4) **Magnetofona Servo:** En 1963 la Komisiito akceptis 10 novajn programojn por la Kolekto de la Magnetofona Servo. 163 diversaj programoj estas nun haveblaj.

Speciale valora aldono al la programaro estas la programo 160: "Junulara Kantĥoro el Ljubljana prezentas kantojn".

Entute estis kopiitaj 97,5 horoj da programoj (kompare kun 116 horoj dum 1962).

Por stimuli produktadon de sonbendaj programoj la Komisiito skribis longan artikolon en "Esperanto" kaj nun preparas eldonon de propra broŝuro, kiu listigos la programojn ankaŭ laŭ la dekuma klasifo kaj laŭ la parolantoj.

La financa situacio de la Servo estas bona. Ĝi montris profiton de 75,53 dolaroj en 1963.

Komisiito: S-ro Rüdiger EICHHOLZ, Esperanto-Press, OAKVILLE, Ontario, Kanado.

(5) **Koresponda Servo:** Fine de 1963, la sliparo ampleksis entute 3000 korespondpetojn, ĉu individuajn, ĉu listigitajn, el kiuj duono de gejunuloj, el 47 landoj. Multaj personoj uzis la Servon plurfoje. Ĉies proponoj estis transdonitaj laŭ la disponebla materialo okaze de rektaj respondoj. Estis skribitaj, dum la koncerna jaro, 250 leteroj kaj 200 poŝtkartoj. La regularo pri la Servo aperis en jarlibroj 1961, 1962, 1963; mallonga ĉiumonata anonco en "Esperanto" bone efikis. Enspezoj kaj elspezoj estis en bona harmonio. La Servo do kontentige funkciis; alvenis multaj dankesprimoj pro valora helpo.

Kiam temas pri novuloj, la Koresponda Servo prefere akceptas nomlistojn (kun mencioj pri aĝo, sekso, ĉefaj intereso) grupitajn de respondecaj kursgvidantoj, al kiuj povas esti direktataj porkorespondaj leteroj. Jam en multaj landoj la korespondservo trovis tiajn bonvolajn helpantojn.

Koresponda Servo de U.E.A.: 12 Rue des Jacobins, Clermont-Ferrand (PdD) Francujo.

(6) **Filma Servo:** La Filma Servo disponas pri 4 propraj filmoj kaj informas pri 5 aliaj. Oslo nun posedas novan kolorfilmon kun optika sono.

Dum la jaro ni povis en kelkaj okazoj servi al petantoj. Ni kunhelpis pri filmo al Karlstad, Svedujo, kaj al la Kursoj en Barlaston, Anglujo.

Spertado kun doganaj aferoj estas timiga: prefere la mendanto tenu la filmon antaŭ ol li anoncas pri ĝia montrado en difinita tempo.

La Servo konsilas la produktadon de 8-mm-aj filmoj, tre taŭgaj por klubaj kunvenoj kaj interŝanĝeblaj; ili ankaŭ estas multe malpli kostaj.

Komisiito: Oskar SVANTESSON, Skonertgatan 1, GÖTEBORG V, Svedujo.

(7) **Eldona Aktiveco:** La eldona aktiveco de UEA manifestiĝis en tri branĉoj: a) Asociaj eldonaĵoj: Jarlibro (Ĉap. III, 7), Revuo "Esperanto" (Ĉap. V/A); b) Literaturaj eldonaĵoj: Revuo "Monda Kulturo" (Ĉap. V/B); libro "Naŭzo" de Sartre (Vd. sube: 9); c) Kunordiga aktiveco: Serio Oriento-Okcidento (Vd. sube 9).

(8) **Serio Oriento-Okcidento:** Aperis kiel No. 3 de la Serio: "Naŭzo" de J. P. Sartre en la traduko de Roger Bernard; eldonis UEA (Ĉap. III, 11).

Elstara kultura evento ne nur en nia movado sed ankaŭ por la ŝatantoj de la itala lingvo, por bibliofiloj kaj artamantoj estas la apero de la luksa eldono de la "Dia Komedio" de Dante Alighieri, kiu enhavas krom la itala originalo esperantan tradukon en la teksto de Giovanni Peterlongo kaj kolekton de preskaŭ cent desegnaĵoj de Sandro Botticelli. Tiun verkegon eldonis "Edizione SIEL, Milano". Ĝi eniris la Serion Oriento-Okcidento kiel eksterordinara numero.

Pluraj aliaj numeroj estas en preparo, estas studata la ebleco akcepti aliajn titolojn.

(9) **Internaciaj Ekzamenoj:** La kvara Sesio de la Internaciaj Ekzamenoj okazis en Sofio la 1-an de Aŭgusto por

la skriba parto, la 2-an por la parola. Ekzamenis: J. BAGHY, F-ino Marjorie BOULTON kaj S-ro I. KRESTANOV. El la kvar kandidatoj sukcesis en la skriba kaj poste en la parola parto nur du: F-ino Cornelia TAVERNA el Triesto kaj S-ro Metodi PANĈEV el Sofio; sekve ambaŭ estis rajtigataj proponi temon de Disertacio al la aprobo de I.E.K.: tio okazis kaj nun ambaŭ kandidatoj prilaboras siajn Disertaciojn.

Post konfirma decido de la Komitato koncerne S-ron I. H. Krestanov, la I.E.K. konsistas el 11 membroj: D-ro A. Albault, S-ro J. Baghy, F-ino M. Boulton, Ing. J. R. G. Isbrucker, Prof. D-ro N. Kawasaki (\*), S-ro I. H. Krestanov, Prof. D-ro I. Lapenna, D-ro P. F. M. Neergaard, Doc. S. Pragano, Prof. J. Régulo Pérez, S-ro J. H. Rosbach. Sekretario de I.E.K. plu estas F-ino Marjorie Boulton.

(10) **Kontrolokomisiono pri Lernolibroj:** La kontrolkomisiono de U.E.A. pri Lernolibroj kiu havas kiel taskon helpi verkantojn de lernolibroj, akceptas por pristudo manuskriptojn kaj post la pristudo donas rekomendojn, konsilojn kaj proponojn al la verkanto.

En la jaro 1963, la Komisiono esploris nur 2 manuskriptojn. El ili unu nun estas prespreta post la finkontrolo de la Komisiono.

La komisiono konsistas el S-roj E. Malmgren (Prezidanto: Heleneborgsgatan 6, Stockholm), A. D. Atanasov, H. Bakker, D. B. Gregor, T. Hodakowski kaj V. Setälä.

(11) **Internacia Arta Teatro:** IAT ankaŭ ĉi-jare partoprenis la programon de la Universala Kongreso (VI. 1). La taskoj de IAT larĝe preterpasas la kadron de la U.K., sed por tion realigi ĝi bezonas la materian apogon de la tuta movado: estas konsilinde kaj honorinde aliĝi al la "Amikoj de Internacia Arta Teatro"; la jara subteno de amiko estas unu dolaro aŭ egalvaloro, de amiko-subtenanto du dolaroj, de amiko-mecenato 10 dolaroj. La subtenojn oni povas sendi tra la CO de UEA, tra la ĉefdelegitoj aŭ perantoj de UEA, aŭ rekte al IAT sub la nomo de ĝia fondinto kaj direktoro Srdjan Flego, 67 Bd. Pasteur, Paris 15 (Poŝtĉekkonto Paris CC 7454-58).

\*) Pro eraro tiu nomo elfalis el la pasintjara raporto.



En 1963 la IAT kunlaboris kun S-ro Jacques Mahé, pretigante la unuan dialogan Esperantan suspens-filmon "Angoroj", vidu pri tio la Revuo Esperanto 1963, pp. 124 kaj 195. La Estraro decidis doni la aŭspicion de UEA al tiu filmo.

## XI. INSTITUTO POR ESPERANTO EN KOMERCO KAJ INDUSTRIO

(1) **Preparlaboroj:** Komence de la jaro 1963, S-ro Wensing unuafoje renkontis S-ron Bruno Vogelmann en Roterdamo. S-ro Vogelmann, en kunlaboro kun siaj rondanoj de Crailsheim, estis eldoninta la libreton "Esperanto en Komercio". Dum la interparolado oni pridiskutis i.a. kiamaniere oni povus atentigi la industrion kaj komercon pri la servoj kaj avantaĝoj kiujn la grand-kala enkonduko de Esperanto kapablas prezenti al la internacia ekonomio. Post longaj diskutoj, oni decidis prepari la fondon de "Instituto", kies celo estos "divastigi per ĉiaj konvenaj rimedoj, la scion kaj konon pri Esperanto en komercio kaj industrio". Poste, S-ro Erik Carlén, industriisto en Hällabrottet, Svedio, aliĝis al la provizora "Stariga Komitato". Tiu komitato multe laboris, kelkfoje kunvenis, zorge preparis statuton, pristudis laborprogramon kaj difinis la vojon irendan, paŝon post paŝo.

La 10-an de oktobro 1963 la "Instituto por Esperanto en Komercio kaj Industrio", en formo de Fondaĵo, estis oficiale registrita, per notaria akto en Nederlando.

La laborprogramo antaŭvidis, kiel unuan paŝon, la dissendon de cirkulero kun folio klariganta la celojn kaj taskojn de la Instituto, al grandaj entreprenoj, firmoj, institucioj ktp., kies agadkampo ampleksas la internacian merkaton. Tiu cirkulero (kun folio kaj aliĝilo por tiuj, kiuj volas finance subteni la Instituton), estis tradukita en la jenajn lingvojn: Esperanto, nederlanda, franca, angla, germana, itala, hispana, sveda, norvega kaj dana. Se necese, tradukoj en aliajn lingvojn sekvos.

(2) **Nuna stato:** La Estraro de la Fondaĵo konsistas el: a) S-ro Erik Carlén, Svedujo, por Skandinavio, b) S-ro Bruno Vogelmann, Crailsheim, por la germanlingvaj

landoj, c) S-ro E. L. M. Wensing, por ĉiuj aliaj landoj.

La Instituto serĉas en ĉiuj landoj t.n. "korespondantojn", kiuj pretas kaj kapablas funkcii kiel "Landaj Officejoj". Ĝis nun oficiale fondiĝis du Landaj Officejoj, nome: a) En Svislando, S-ro J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, Zürich. b) En Italujo, Centro por Esperanto en la Komercio, Industrio kaj Turismo (CEKIT), Via Villorosi 38, Milano (sub la gvidado de S-ro Felice Bertoletti).

CEKIT akceptis prilabori la programon f) art. tri de la statuto, kiu tekstas: "kolekti adresojn de ĉiuj entreprenoj, institucioj, publikaj organoj kaj servoj, kiuj sciopovas korespondi en Esperanto; regule eldoni aŭ eldonigi la kolektitan adres-materialon".

Libervole anoncis sin S-ro F. Munniksma, Amsterdamo, faka tradukisto por la angla lingvo en granda nederlanda, farmacia entrepreno kaj membro de la nederlanda ekzamen-komitato por angla komerc-korespondo. S-ro Munniksma akceptis okupi sin pri la programo i) art. tri de la Statuto, kiu tekstas: "instigi fakspcialistojn en ĉiuj branĉoj de komercio kaj industrio por ke ili kunlaboru por la kompilado de specifaj fakvortaroj en Esperanto; eventuale prizorgi la eldonon de tiuj vortaroj".

S-ro Munniksma verkis tre detalan laborprogramon, kiu trovis planan aprobon i.a. de D-ro Albault, Tuluzo, kaj de Ing. Haferkorn, Berchtesgaden. Ambaŭ donis valorajn sugestojn kaj promesis aktivan kunlaboron. Por la internacia laborkomitato por la prijuĝo, komento, pristudo kaj kontrolo de la nova fakterminaro, dume anoncis sin tre spertaj kaj kapablaj kunlaborantoj en Italujo, Germanujo, Svedujo, Jugoslavio, Nederlando, kaj en pluraj aliaj landoj la intertraktoj daŭras ankoraŭ.

La Nederlanda Officejo en Eindhoven jam komencis sian kampanjon antaŭ kelkaj monatoj kaj kolektis ĝisdate sufiĉe konsiderindan sumon. La Estraro plene akordiĝas, ke la Instituto neniel povas realigi siajn celojn, se ne ekzistas fortika, financa bazo sur kiu apogiĝas la tuta agado. Do, provizore la tri estraranoj dediĉas siajn fortojn kaj energion al la kolektado de financaj rimedoj kaj nur poste entreprenos la aliajn, *verajn* taskojn, i.a. kampanjojn en la gazetaro, intervjuojn kun industriistoj kaj entreprenistoj, radioprelegojn, reklamojn kaj anoncojn en

fakjurnaloj kaj gazetoj, eldonon de speciala revuo, kiu ĉefe pagiĝos el anoncoj kaj reklamoj.

## XII. JUNULARO

(1) **Enkonduka rimarko:** La ĵus pasinta periodo en la agado de TEJO grave distingigas de la antaŭaj. Surbaze de la principoj de la Unua Perspektiva Laborprogramo de TEJO, akceptita antaŭ unu jaro, la Organizo dediĉis la jaron al la enkonduko de novaj laborformoj kaj al streĉa agado interne de la Movado.

(2) **Junulara Jaro:** 1963 pasis sub la signo de la unua monda kampanjo de la esperantista junularo, la "**Junulara Jaro**" anoncita de UEA kaj TEJO. Tiu kampanjo kreskigis la interesigon pri la junulara agado, la helpon al ĝi kaj, fine, la junularan aktivecon mem. La kulmina punkto de la Jaro estis la 19-a internacia Junulara Kunveno en Vraca (Bulgario) kun la rekorda nombro de 540 gejunuloj el 22 landoj. Granda atingo de la Jaro estis la ekapero de la internacia junulara revuo "Kontakto". La Komitato de UEA decidis senpage aldoni la revuon al ĉiuj individuaj membroj de UEA sub 25 jaroj. Ankaŭ sekve de tio pligrandigis la nombro de JMA. La Jaro estis oficiale fermita dum la 7-a Internacia Seminario de GEJ en München kun la ĉeftemo "Eŭropa kulturo — unueco en vario?" pritraktita de eminentaj prelegintoj. Tiun, unu el la plej elstaraj kulturaj aranĝoj de la Movado en 1963, partoprenis ĉ. 100 gejunuloj el 17 landoj.

(3) **Landaj sekcioj:** Altiĝis la nombro de landaj sekcioj kaj ties aranĝoj. Fine de 1963 aliĝis al TEJO Korea Junula Esperanto-Asocio (KJEA) kaj Hungara Esperanto-Junularo (HEJ), kaj en la komenco de januaro fondiĝis Aŭstralia Esperantista Junulara Asocio (AEJA), kiu tuj aliĝis. Nun TEJO havas entute 18 LS. — Speciale menciindaj aranĝoj de la LS okazis en Barcelono, Kłodzko (Pollando), Tokio, München (supre menciita) kaj Adelboden (skiferio). — Nova junulara Esperanto-gazeto estas la madagaskara "Junulara Kuriero".

(4) **Neesperantistaj Organizaĵoj:** La pasintjare komen-

cita kampanjo NEO (Neesperantistaj Junularaj Organizaĵoj) interese evoluas. La Estraro de TEJO dank' al la valora kunlaboro de Ans kaj Hans Bakker (filo) komencis kunlaboron kun Monda Asembleo de Junularo (WAY). Plie komenciĝis kontaktoj kun Monda Federacio de Demokrata Junularo (reprezentita en Vraca) kaj Internacia Unuiĝo de Studentoj. Kun la gvidantoj de tiuj organizaĵoj reprezentanto de la Estraro de TEJO faris oficialajn interparolojn vintre 1963/64 en Bruselo, Budapeŝto kaj Praha. Tiuj organizaĵoj kaj aliaj deklaris sin pretaj reprezentiĝi dum la 20-a IJK en Amsterdam. La ĉefa celo de tiuj paŝoj estas prepari la grundon por vastskala informado pri kaj instruado de Esperanto en ĉiuj junularaj medioj. Pluraj sukcesoj estis atingitaj de landaj sekcioj: rubrikoj en gazetoj de la Eŭropa Konsilantaro, internaciaj kursoj de Esperanto, kunlaboro kun la nederlanda komitato de WAY, kursoj por japanaj gvidantoj de WAY, internaciaj skoltaj tendaroj kunlabore kun Pola Skolta Asocio.

(5) **Aliaj agadoj:** Ankaŭ aliaj fakoj de TEJO montras progreson. Pligrandiĝas la nombro de kulturaj aranĝoj. Konsiderinde kreskis la nombro de la oratoraj konkursoj, kaj ilia nivelo same plialtiĝis. Generale multe pliboniĝis la financa stato de TEJO, kvankam pro la ĉiam pli vastaj aktivecoj la nunaj monaj rimedoj apenaŭ sufiĉas por financi la plej necesan administran agadon. Agado en lernejoj estas komencita kaj ĝia plilargiĝo planata kunlabore kun UEA. La Estraro de TEJO preparas novan kampanjon por Afriko komencotan en 1965.

(6) **Adresaro:** La nomoj kaj la adresoj de la estraranoj, komitatanoj, landaj sekcioj de TEJO kaj iliaj funkciuloj troviĝas en la Jarlibro de U.E.A., 1964, p.p. 67 kaj sekv.

## XIII. ĜENERALA TRARIGARDO

(1) **Literaturo:** En la jaro 1963/64 rimarkeble kreskis la nombro kaj amplekso de la libroj eldonitaj en Esperanto, kompare kun la antaŭa jaro. Interesaj fenomenoj estis la aktiviĝo de la Fremdlingva Eldonejo de Pekino, kiu eldonis dum la jaro entute 13 broŝurojn, kaj la apero de



la broŝuro "Kantoj de Sovetaj Komponistoj", kiu ŝajne estas la unua soveta eldonaĵo en la Internacia Lingvo (ekster lernolibroj) de post 1936.

El belliteratura vidpunkto la jaro estis vere memorinda pro nombro da imponaj volumoj. Krom la Dia Komedio de Dante Alighieri kaj "La Naŭzo" de Jean-Paul Sartre, notinda estas la kolekto "Noveloj de Lusin" de Ĉina Esperanto-Ligo. Sur la kampo de la originala literaturo distingiĝas la nova longa romano de Raymond Schwartz: "Kiel akvo de l' rivero", ĉie laŭdita de la kritikistoj, kaj la reeldonoj de poemaro "Duonvoĉe" de G. E. Maura kaj romano "Homoj sur la tero" de Stellan Engholm. Aliaj gravegaj kaj bonvenaj reeldonoj estas la kvinlingva Fundamento de Esperanto, kun komentario de D-ro Andreo Albault, kaj "Lingvo Stilo Formo" de Kalocsay — la unua el Francujo kaj dua el Japanujo. Dank' al Sifafeto povis aperi du postmortaj manuskriptoj: la ilustrita "Aventuroj de pioniro" de Edmond Privat kaj la poezieca "Vivo kaj opinioj de Majstro M'saud" de Jean Ribillard. Tute aparte staras la nova biografio pri Zamenhof de Marjorie Boulton sub titolo "Zamenhof, aŭtoro de Esperanto" — solida volumo kun valoraj reproduktaĵoj. Tiu ĉi resumo ne povas inkluzivi ĉion menciindan, sed utilas fine noti, ke aperis pluraj novaj terminaroj: skolta, filatela, elektroteknikaj kaj katolikaj.

(2) **Revuoj kaj gazetoj:** La suma nombro de la Esperanto-periodaĵoj ne multe ŝanĝiĝis en la pasinta jaro, ĉar la kelkajn perdojn kompensis ankaŭ gravaj gajnoj. Konvena debuto por la Jaro de la Junularo estis tiu de la junulara revuo "Kontakto", kiu aperas regule ekde 1964 kun enhavo traktanta junularajn interesojn sen rekta rilato al Esperanto. Certe tiu nova iniciato de TEJO meritas ĉies apogon. El Bulgarujo aperas nova luksa turisma revuo grandformata: "Ripozoj". Pri-Esperantaj studoj nun aperas en la novaj "Kajeroj" de Jugoslaviana Esperanto-Instituto kaj en la itala lingvo en "Rivista Italiana di Esperanto", imitinda esperantologia revuo sur plej alta nivelo, por informaj celoj.

Bedaŭrinde, estas anoncita la malapero de "Vjetnamio antaŭenmarŝas", "Birdo", kaj "Jugoslavia Esperantisto", sed anstataŭ tiu lasta reaperos baldaŭ la "Suda Stelo".

Aliflanke, firmigis siajn poziciojn la grava revuo de UEA "Monda Kulturo" (ekde la vintra kajero de 1963/64 sub redakto de D-ro A. Albault — vidu ĉap. V.B.), "Norda Prismo" (jam dekjara), la popularscienca "Homo kaj Kosmo", kaj la grafike tre impona katolika revuo ilustrita "Nova Civito". Jam en 20.000 ekz. aperas la senpaga "Okcidentgermana revuo". Entute sufiĉe kontentiga pozicio, kvankam oni povus deziri malpli da ripetaĵoj rilate la enhavon, precipe en la organoj de landaj asocioj. Multaj gazetoj meritas kaj bezonas pli vastan apogon de la publiko: tiurilate estus tre bone, se en ĉiu klubo oni regule buĝetus almenaŭ kelkajn kolektivajn abonojn.

(3) **Lernolibroj:** Aperis pluraj pliaj lernolibroj en diversaj landoj dum la pasinta laborjaro, inter kiuj estu menciitaj du polaj, meksika kaj hispana. En Francujo aperis speciala kurso de S-ro A. Ribot, konsistanta el 6 diskoj. Eldoniĝis la tria eldono de la internacia lernolibro de C. Walter. Kune kun la lernolibroj de Szilágyi kaj Setälä ĝi ebligas la instruadon en landoj, ankoraŭ sen propra lernolibro. Kiel sciante, UEA faris por la libro de Setälä, kiun ĝi kuneldonis, instrukciojn en pluraj lingvoj, kaj en la pasinta laborjaro al ĝi estis ligita ankaŭ korespondanta kurso, ellaborita de D-ro Sadler surbaze de liaj spertoj en Cejlono. Aperis norvega kaj ĉina vortaroj kaj la sveda Esperanto-gramatiko de Carlén. Al la tuta afero de lernolibroj ktp. por lernejanaj, la Lerneja Konferenco en Beograd kaj la Konsulta Komisiono pri Lernejoj donas apartan atenton (IX, 1-2). Vidu ankaŭ X. 10 pri la Kontrolkomisiono de Lernolibroj.

(4) **Radio:** Kiel evidentiĝas el la raporto de CED, en 1963 en 13 landoj 20 radiostacioj elsendis entute 1.701 programojn en Esperanto. Pola Radio, Varsovio, daŭre sendadas duonan horon ĉiutage. Aliaj bonaj programoj estas elsenditaj de Romo, Berno, Zagreb k.a. (vidu la listojn regule aperantajn en "Esperanto"). Estus dezirinde, ke pli multaj aŭskultantoj sendu al la redakcioj de la programoj leterojn por tiel kuraĝigi la sindonajn homojn, kiuj, ofte nur post malfacilaĵoj sufiĉe grandaj, sukcesis eksendi, kaj kiuj nun streĉas ĉiujn fortojn por daŭrigi kaj plibonigi la programojn.

(5) **Resumoj, Rubrikoj kaj Kursoj en Gazetoj:** Kiel antaŭe, ankaŭ ĉijare aperis multaj fakaj kaj sciencaj periodaĵoj kun regulaj resumoj en la Internacia Lingvo. Resumoj estis aldonitaj ankaŭ al verkoj de sciencistoj-esperantistoj. Okazis radio- kaj gazetaj kursoj de la lingvo, i.a. en Finnlando deponitaj aŭg. 1963. Certe, tiuj eblecoj povas esti pli efike eluzataj, tute aparte en pli malgrandaj aŭ anoncaj gazetoj, kiel montris la spertoj el Nederlando antaŭ kelkaj jaroj.

(6) **Trafiko kaj komerco:** Regule aperadas turismaj prospektoj kaj gvidlibroj en Esperanto aŭ kun aldona klarigo en la Internacia Lingvo. Certe rezulte de la impona Sofia Kongreso, en Bulgarujo ekaperis nova granda turisma revuo nomita "Ripozoj". Pluraj firmaoj utiligas por sia reklamo i.a. Esperanton, kiu lingvo estas uzata ankaŭ de kelkaj foiroj. Pligrandiĝis la nombro de reklamoj en la Jarlibro kaj en la Revuo "Esperanto".

(7) **Prelegvojaĝoj kaj konferencoj:** Laŭ informoj en la Esperanto-gazetaro, multaj vojaĝantaj esperantistoj faris prelegojn en diversaj landoj en la Internacia Lingvo. La ĝenerala sekretario, la vic-prezidanto S-ro Wensing kaj la KKS faris plurajn prelegojn lige kun siaj vojaĝoj en diversaj funkcioj, kaj krome estu menciite, ke estis faritaj multaj prelegoj en Azio kaj Afriko (vidu VIII.10-11).

#### XIV. KONKLUDO

En la lastaj jaroj, tute aparte deponitaj la akceptiĝo de la Unua Laborplano de la jaro 1955, en ĉiam pli alta grado en la agado de la Asocio, de la fakaj, landaj kaj lokaj organizaĵoj, kaj de multaj unuopaj esperantistoj estas bone kombinitaj la idealismo, kiun Movado kiel la nia ne povas malhavi por povi venki la multspecajn obstaklojn renkontatajn, kaj la koncepto pri Esperanto kiel praktika internacia komunikilo.

El tiu vidpunkto devas esti rigardata la laboroj de ĉiuj niaj organizaĵoj surbaze de la Laborplano de UEA kaj de la diversaj planoj de agado ellaboritaj surbaze de ĝi. El tiu vidpunkto oni devas rigardi ankaŭ la promesoplenan agadon, kiun komencis la Instituto por Esperanto en

Komerco kaj Industrio. La perspektivoj estas larĝe malfermitaj al ĉiuj niaj membroj. Necesas plej energie atingi la postulatan unuecan agadon kaj ankaŭ vaste diskonigi pere de nia tuta gazetaro kaj ĉiuj niaj organizaĵoj la konkretajn celojn, la atingitajn rezultojn kaj la plenumotajn taskojn. La Esperanto-Movado kaj Universala Esperanto-Asocio estas sufiĉe fortaj por efike antaŭenigi la Internacian Lingvon, sed nur sub la kondiĉo ke ni sukcesu elimini ĉiujn negativajn trajtojn kaj alkroĉiĝu al tiuj pozitivaj laboroj kiuj ne povas ne konduki al sukcesoj.

Prof. D-ro Hideo Yagi  
Prezidanto

Prof. D-ro Ivo Lapenna  
Ĝenerala Sekretario

Sven Ziegler

Helpa Sekretario

## RAPORTO PRI LA AGADO

de la

### CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

por la periodo de 1-IV-1963 ĝis 1-IV-1964

#### A. ORGANIZAJ DEMANDOJ

(1) **Oficejo:** Ĝi plue troviĝas en 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo. La Oficejo posedas la necesan oficejan ilaron, kiu kontentigas la bezonojn. La teknika laboro de multobligado kaj ekspedado de la dokumentoj kaj aliaj publikaĵoj estas farata en la C.O. en Rotterdam. Parto de la arĥivo de CED el la antaŭaj jaroj estis transportita en la C.O., tiel ke liberiĝis iom da spaco en la Oficejo de CED.

(2) **Kunlaborantoj:** La reto de kunlaborantoj restis praktike senŝanĝa. Fine de la laborjaro CED havis entute 82 kunlaborantojn en 23 landoj.

(3) **Kontaktoj:** La kontaktoj kun kunlaborantoj realiĝas ĉefe per korespondado. Kun la britaj kunlaborantoj, kaj ankaŭ kun alilandaj okaze de vizitoj aŭ internaciaj renkontiĝoj, la Direktoro havis plurajn personajn kontaktojn por diskuti diversajn demandojn en la laboro de CED.

(4) **Financa Situacio:** La konto de CED aperas en la kadro de la Financa Raportaro de UEA. Kiel oni vidas el tiu konto, la tuta sumo de la elspezoj, inkluzive la salajron de la sekretariino, estis £ 633-11-3, do je pli ol 100 pundoj malpli ol la buĝetita sumo de £ 750-0-0. Tio ŝuldiĝas al la fakto, ke la eldono de kelkaj planitaj dokumentoj bedaŭrinde ne povis realiĝi pro manko de tempo. La buĝeto por 1963 antaŭvidis, ke la sumo de donacoj estos £ 100-0-0. Efektive, la donacoj estis entute £ 138-11-3, el kio preskaŭ duonon kontribuis unu sola persono, s-ro E. F. Dean el Britujo, kiu pro sia daŭra apogo al CED meritas apartan mencion kun danko en tiu ĉi raporto.

La subvencio el la Propaganda Konto estis buĝetita je £ 650-0-0, sed pro la menciitaj kaŭzoj ĝi efektive estis nur £ 491-18-11.

#### B. PLENUMITAJ LABOROJ

(1) **Dokumenta Materialo:** Ĝis la 1-a de aprilo 1963 entute estis kolektitaj, ordigitaj kaj katalogitaj 2097 dokumentoj. Krome, estas katalogitaj entute ĉ. 3800 eroj el diversaj libroj, revuoj kaj gazetoj.

(2) **CED-Dokumentoj:** Ĝis la 1-a de aprilo 1963 CED eldonis 22 pliajn dokumentojn, tiel ke entute estas eldonitaj 199 diversaj dokumentoj laŭ la serioj kaj titoloj establitaj okaze de la fondiĝo de CED en 1952. Entute ĉ. 300 institucioj kaj individuaj personoj regule ricevas la CED-dokumentojn en la angla kaj kelkfoje en aliaj naciaj lingvoj. Krome, ĉiuj dokumentoj estas sendataj ankaŭ al la landaj asocioj kaj komitatanoj de UEA. Ofte okazis, ke institucioj, kiuj ne troviĝas sur la listo, petis diversajn dokumentojn, precipe la pli gravajn, kaj CED kutime plenumis la petojn. La nombro de dokumentoj tiamaniere distribuataj estas sufiĉe granda. Inter la organizaĵoj kaj unuopaj personoj, al kiuj estis senditaj diversaj dokumentoj en la pasinta jaro laŭ ilia eksplicita peto, troviĝas redakcioj de gazetoj kaj revuoj, radio-raportistoj, lernejestroj, personoj kiuj kandidatisis UEA por la Nobel-Pacpremio. Pri kelkaj dokumentoj de CED aparte interesiĝis la Sekretariato de UNESKO kaj CED volonte liveris ilin en la petita pli granda kvanto. Ĉi tie necesas ankoraŭfoje atentigi pri io, kio grave ĝenas la laboron de CED. Ankaŭ en la pasinta jaro okazis, ke esperantistaj organizaĵoj, precipe lokaj grupoj, kaj unuopaj esperantistoj turnis sin al CED kun petoj pri livero de tiu aŭ alia dokumento, pri dono de tiu aŭ alia informo. CED klopodis plenumi ankaŭ tiujn petojn, kvankam tio ne estas ĝia tasko. Estas vere urĝe necese, ke la landaj asocioj kaj eble ankaŭ la pli grandaj lokaj grupoj organuzu aŭ vastigu siajn proprajn centrojn de informado kaj dokumentado, kiuj povos liveri taŭgajn materialojn en siaj propraj naciaj lingvoj, utiligante, kompreneble, la dokumentojn eldonatajn de CED. Per siaj pli ol limigitaj

financaj rimedoj kaj laborfortoj CED tutsimple ne povas elteni la ĝisnunan ŝarĝon sen endanĝerigi la fundamentan taskon, por kiu ĝi estas fondita, nome liveradon de dokumentoj al neesperantistaj internaciaj organizaĵoj kaj instancoj, aŭ al la plej gravaj naciaj institucioj kun internacia karaktero. CED plue liveros ĉiujn siajn eldonaĵojn ankaŭ al la landaj asocioj, se eble en Esperanto (vidu la p-ton 3), sed estas afero de la landaj asocioj utiliĝi, laŭ la cirkonstancoj, tiujn materialojn por informado de siaj propraj instancoj kaj por helpo al la lokaj grupoj.

(3) **Dokumentoj en Esperanto:** Konsiderante la ĉiam pli grandan nombron de lokaj Esperanto-grupoj kaj unuopaj esperantistoj, kiuj en la lasta tempo petis diversajn dokumentojn de CED, CED decidis eldonadi estontece siajn dokumentojn ankaŭ en la Internacia Lingvo, se troviĝos minimume 100 regulaj abonantoj. La jarabono por la Esperantlingva eldono estos gld. 5,50. Se ne troviĝos 100 abonantoj ĝis la fino de aprilo, la dokumentoj aperados, kiel ĝis nun, nur en la angla kaj kelkfoje en aliaj naciaj lingvoj.

(4) **Lernejoj:** La enketo pri la instruado de Esperanto en la lernejoj, farita de la kunlaboranto de CED pri lernejaj aferoj, s-ro D. Kennedy, estis kompletigita ĝustatempe kaj la ĉefaj rezultoj povis esti komunikitaj en aparta raporto al la Lerneja Konferenco en Beograd. La rezultoj de la enketo estis publikigitaj en aparta 16-paĝa presita dokumento Doc. B/IV/9, kiu enhavas la liston de ĉiuj lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata en la jaro 1962/1963, laŭ la landoj, lokoj, kun detaloj pri la gelnantoj, nomoj kaj adresoj de la geinstruistoj. Tiu dokumento estis sendita ne nur al ĉiuj regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj, sed, per aparta cirkulero, ankaŭ al ĉiuj lernejoj, kies adresoj troviĝas en la listo, kun la konsilo establi reciprokajn kontaktojn. La enketo montris, ke en 1962/1963 Esperanto estis entute instruata en 563 lernejoj de 32 landoj al 16.272 gelnantoj kompare kun 471 lernejoj de 27 landoj en 1961/1962, 356 lernejoj de 27 landoj en 1959/1960, 142 lernejoj de 22 landoj en 1955/1956 kaj 114 lernejoj de 15 landoj en 1950/1951.

(5) **Specialaj dokumentoj:** Krom la menciita Dok. B/IV/9, aparte menciinda estas ankaŭ Dok. B/IV/10 kun la raporto pri la Internacia Konferenco de la Lernejoj, en kiuj Esperanto estas Instruata. Ĝi aperis kun presita kovrilo en multe pli granda kvanto ol la aliaj dokumentoj de CED. Interalie, tiu dokumento kaj B/IV/9 estis senditaj al ĉiuj naciaj branĉoj de la Internacia Federacio de Instruistaj Profesioj. La studoj de la Direktoro de CED "La Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj" (A/II/1) kaj "Kelkaj Aspektoj de la Lingva Problemo en Internacia Publika kaj Kompara Juro" (A/II/2) kun 3 aldonoj (entute 24 dense presitaj grandformataj paĝoj kun kovrilo) aperis en la angla lingvo en 2.000 ekzempleroj. Tiu dokumento estas ankaŭ vendata al ĉiuj interesiĝantoj. CED ricevis multajn gratulojn pro tiuj dokumentoj kaj ĝi posedas informojn ke sufiĉe granda nombro da personoj eklernis la lingvon post tralego de tiuj dokumentoj.

(6) **Stratoj:** CED daŭrigis la kolektadon de informoj pri stratoj aŭ placoj kun la nomoj "Doktoro Zamenhof" aŭ "Esperanto".

(7) **Radio:** Laŭ la statistiko, ellaborita de la kunlaboranto de CED por la radio, s-ro G. Larglantier, Francujo, la nombro de la regulaj radio-elsendoj en 1963 estis entute 1.701 kompare kun 1.677 en 1962, kaj 1.485 en 1961. Entute 20 stacioj en 13 landoj, precize kiel en 1962, elsendis programojn en la Internacia Lingvo kompare kun 15 stacioj en 12 landoj en 1961.

(8) **Bibliografio:** Bedaŭrinde Mag. W. Auld ne povis liveri la manuskripton de la Bibliografio, kiel promesite. Nun tiun laboron transprenis s-ro Edw. P. Ockey, Britujo, kaj oni povas esperi, ke la verko aperos en 1964.

(9) **Index Translationum:** S-ro Ockey nun transprenis la taskon regule kaj ĝustatempe ellaboradi la listojn de tradukoj laŭ la normoj postulataj de Index Translationum. Li jam komencis sian laboron.

(10) **Universala Ekspozicio:** Artikolo pri ĝi aperis en la rubriko de CED en la februara numero de "Esperanto".

Se la cirkonstancoj iel permesos, la 7-a elmonro, kompletigita per novaj publikaĵoj, okazos en Hago samtempe kun la Universala Kongreso. CED varme petas ĉiujn eldonejojn sendi po unu ekzemplero de siaj eldonaĵoj al la C.O. de UEA en Rotterdam por la Universala Ekspozicio.

(11) **Foto-Servo:** Kompletigita per pluraj novaj foto-dokumentoj.

(12) **Ekonomiaj Malavantaĝoj de Multlingveco:** Estas kolektitaj pluraj novaj dokumentoj, kiuj estos utiligitaj en konvena momento.

(13) **Tradukmaŝinoj:** La kunlaboranto de CED, D-ro Viktor Sadler, bedaŭrinde ne plu povas sekvi la evoluon sur tiu ĉi kampo. Nova kunlaboranto estas serĉata.

(14) **Nobel-Premio:** Ankaŭ ĉijare CED liveris dokumentojn al personoj, kiuj deziris kandidatiĝi UEA por la Nobel-Pacpremio en 1964.

(15) **La Eduka Valoro de la Esperanto-Instruado en la Lernejoj:** Pere de sia kunlaboranto pri pedagogiaj demandoj, s-ro R. Markarian, CED entreprenis enketon pri tiu demando. La demandaro estas sendita al sesdeko da lernejoj en diversaj landoj. La respondoj jam komencis alveni. CED esperas kompletigi la enketon kaj publikigi pri tio ampleksan dokumenton antaŭ la Kongreso en Hago.

(16) **Esperanto-Societoj:** CED entreprenis enketon pri la nombro de la lokaj Esperanto-societoj en la mondo. La demandaro kun instrukcioj rilate la respondojn estas sendita al ĉiuj aliĝintaj kaj nealiĝintaj landaj asocioj, kiel ankaŭ al perantoj aŭ aliaj reprezentantoj en regnoj sen landaj asocioj. La sukceso de la enketo dependas de la kunlaboremo de la landaj organizaĵoj kaj unuopuloj petitaj pri kunlaboro. Se la respondoj estos kontentigaj, CED eldonos apartan dokumenton kun la listo de ĉiuj lokaj Esperanto-societoj.

(17) **Raportoj:** Regulaj koncizaj raportoj pri la agado de CED aperis en la revuo "Esperanto".

### C. LABORPLANO POR 1964/1965

(1) **Kunlaborantoj:** Altiri kompetentajn kaj kvalifikitajn specialistojn, pretajn kontribui al la laboro de CED, kiel kunlaborantojn.

(2) **Dokumenta Materialo:** Daŭrigi la kolektadon jaŭ la ĝisnuna sistemo.

(3) **Dokumentoj:** Daŭrigi la regulan eldonadon kaj, se necese, eldoni specialajn, presitajn dokumentojn kiel en la pasinta laborjaro; eldoni la dokumentojn ankaŭ en Esperanto se troviĝos minimume 100 regulaj abonantoj.

(4) **Bibliografio:** Publikigi la Bibliografion por la periodo 1945-1962, kiu ne povis esti publikigita pro la kaŭzoj menciitaj en la raporto, kaj daŭrigi la Bibliografion por 1963 kaj 1964.

(5) **Index Translationum:** Liveri al la redakcio la liston de Esperantlingvaj tradukoj por 1963 kaj 1964 kaj prizorgi la publikigon.

(6) **Radio:** Statistiko pri la elsendoj en 1964.

(7) **Stratoj:** Daŭrigi la kompletigadon de la listo.

(8) **Ekonomiaj Malavantaĝoj de Multlingveco:** Daŭrigi la kolektadon de dokumentaj materialoj kaj publikigi informojn de tempo al tempo.

(9) **Tradukmaŝinoj:** Plue sekvi la evoluon kaj, se eble, publikigi studon pri la afero.

(10) **Lernejoj:** Komence de 1965 entrepreni novan enketon pri la instruado de Esperanto en la lernejoj en la jaro 1964/1965.



(11) **Esperanto-Societoj:** Publikigi la rezultojn de la nun farata enketo.

(12) **Nombro de Esperantistoj:** Okazigi en 1965 enketon pri la nombro de personoj, kiuj parolas la Internacian Lingvon.

(13) **Jaro de Internacia Kunlaborado:** Se UEA entreprenos specialan kampanjon en 1965, kiun la Ĝenerala Asembleo de U.N. proklamis "Jaro de Internacia Kunlaborado", publikigi apartan dokumenton laŭ la modelo de CED/5, kompletigitan kaj adaptitan al la celo.

(14) **Faktoj pri Esperanto:** Publikigi, se iel eble, la duan, kompletigitan, eldonon de la verko "La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto", ĉar tiu tasko ne povis esti plenumita en la pasinta laborjaro.

(15) **Aliaj Taskoj:** Plenumi eventuale aliajn taskojn, precipe en ligo kun la "Jaro de Internacia Kunlaborado", konforme al eventuala decido de la Estraro.

Prof. D-ro Ivo Lapenna,  
Direktoro de CED

## ALDONO

### Raportoj de Landaj, Fakaj kaj Neneŭtralaj Asocioj

La sekvantaj notoj estas kompilitaj de raportoj de la koncernitaj organizaĵoj.

#### I ALIGINTAJ LANDAJ ASOCIOJ

1) **Argentino.** La Ligo Argentina de Esperanto havas nuntempe 300 membrojn en 9 lokaj grupoj. La revuo Argentina Esperantisto aperis 3 foje dum la pasinta jaro. Proksimume 300 lernantoj ĉeestis la kursojn por komencantoj kaj 60 personoj tiujn por progresintoj, okazigitaj de la grupoj. Menciindaj estas la ripetoj de la nedevigaj kursoj en la lernejo "Presidente Roca" en Buenos Aires, en la "Facultad de Filosofía" de Rosario kaj en la "Escuela Normal No. 4" de Rafaela. En Rosario ripetigis por la 6a fojo la Festivalo de Esperanto, surbendigita por la Magnetofona Servo de U.E.A. En Buenos Aires oni disaŭdigis kantojn en Esperanto per televido. La Asocio de Necochea sukcesis per informojn de la eksterlando por la formado de la "lernejo diferencigita". Okazis entute 6 ekspozicioj surbaze de infandeseĝnaĵoj diverslandaj. En Buenos Aires kaj Rosario okazis diversaj prelegoj, en la unua okazo de la vizito de s-ino Worcester kaj en la dua en Rotaria Klubo. En ambaŭ urboj la Zamenhofa Tago estis digne memorigita. Dum la Jarkunveno de la Ligo en Florencio Varela oni decidis okazigi la 13an Arg. Kongreson en la urbo Río Cuarto. La Ligo povis reorganizi la Korespondan Kurson kaj la Informan Servon.

2) **Aŭstrio.** Aŭstria Esperantista Federacio. Okazis demonstracio ĉe la festo de la laboristaro dum la 1-a de Majo 63 kun disdono de miloj da flugfolietoj. S-ro Dr. W. Nežbeda, aŭstra ambasadoro en Sofio estis komisiita, reprezenti oficiale nian landon. En GRAZ okazis en julio 1963 KELI-renkontiĝo. En septembro 1963 estis aranĝita Ekspozicio de "Laborista Ĉambro" Wien. Esperantistoj multflanke atentigis pri nia afero. Juna universitatano

PERKO el Graz parolis pri la efika laboro ĉe studentoj de la stiria ĉefurbo. Alvenis G. BERNFELD el Wellington. Parolado de li ĉe popolkleriga instituto "URANIA". Efika aŭtuna renkontiĝo de esperantistaro okazis en Wien. La aŭstria ambasadoro Dr. Wilhelm Nezbeda sendis el Sofio plur-paĝan raporton en franca lingvo pri la okazintaĵoj de la 49-a al nia Ministerio por eksteraj aferoj. 3-landa esp renkontiĝo okazis en BREGENZ. Partoprenis pli ol 100 vizitintoj el Svislando, Germanujo kaj Aŭstrujo. Estis organizita oficiala akcepto flanke de komunumo. Ĉiuj vienaj grupoj sendis siajn reprezentantojn al la monata kunveno de "Viena Esp. delegitaro". Kiel kroniĝon de la ĉiujara laboro la viena esperantistaro kolektiĝis al D-ro L. L. Zamenhof-festo.

3) **Belgujo.** Belga Esperanto-Federacio (B.E.F.). B.E.F., kies administrado estas nun modernigita, tiel ke estas en ĝia sino, krom funkciuloj pri ĝeneralaj taskoj, aro da apartaj respondeculoj pri la agado en ĉiu el la du landpartoj, igis la jaron 1963-an la plej aktiva, rilate laboron por Esperanto, depost la lasta mondmilito.

La propaganda kaj informa laboro estis grandskale pli-intensigata ĉiuflanke.

(a) Serio da belaspektaj ekspozicioj, organizitaj ĉefe en la regiono de Antverpeno, atentigis novajn milojn pri la lingvo. Menciinda estas la grava nombro de intelektuloj, kiuj kontaktiĝis kun la movado, same kiel la surloka oficiala apogo kiun ni renkontis. Prelegoj kun lum-bildoj, kiuj okazis ĉe la inaŭguroj, vekis interesigon ĉe diversaj eminentuloj.

(b) La nombro de komunikoj pri Esperanto, kiuj estis sendataj al kaj publikigataj per la gazetoj, konsiderinde kreskis. — Eĉ diversaj turismaj kaj aliaj oficialaj kalendaroj nun ĉiusemajne publikigas senpagan anoncon pri Esperanto-kunveno. La organo "Sonorilo", regule aperadis. La movado ankaŭ ekdisponis pri trafa, moderna flugfolio, unu por ĉiu nacia lingvo, por amas-uzado kaj sendado. Ni ankaŭ povis akiri, ĉe la ŝtata poŝtoŝtanco, specialan stampilon pri Esperanto, kiu troviĝas sur miloj da leteroj neesperantistaj. — La Eldonejo-Librejo "Sonorilo" sendis dum la tuta jaro gravan kvanton da Esperantaĵoj ĉien en la mondon.

(c) Kiel en antaŭaj jaroj, diversaj novaj filmoj estis esperantigataj. — En la kinejoj, ne nur de gravaj sed ankaŭ de malgrandaj urboj, B.E.F. iniciatis kampanjon, kiu ankaŭ atentigis la amasojn pri nia lingvo.

(d) Sekve de tio, la perkoresponda kurso de la Federacio devis esti reorganizata sur nova bazo. Krome, deko da novaj buŝaj kursoj estis malfermataj en diversaj urboj de la lando. Proks. 230 personoj ekstudis la lingvon. Rimarkinda estas la plialtiĝo de la intereso en la edukaj medioj: precipe en la franclingva landparto nombro da diplomitaj instruistoj akiris Esperanto-diplomon. Nia valona prezidanto, s-ro P. Denoel, sukcesis havigi al nia ligo la subtenon de oficialaj pedagogiaj instancoj. La samon oni nun alstrebas en la flandra landparto. Finfine Esperanto estis la objekto de parlamenta demando: la Ministro pri Publika Instruado deklaris antaŭ la Senato ke li principe estas favora al la enkonduko de Esperanto en la lernejoj. Cetere la rezolucio pri la Beograda Konferenco aŭ informoj pri ĝi aperis en 14 belgaj gazetoj. Belgujo estas preta, kunlabori kun UEA rilate la subskribon de Interŝtata Konvencio. Publika debato pri Esperanto okazis inter S-ro M. Jaumotte, komitatano de UEA, kaj S-ro Alfandari, la kreinto de unu plia, kaj tioma, projekto de lingvo ("Neo"). La klarigoj de S-ro Jaumotte estis tiaj ke, je la granda surprizo de multaj ĉeestantoj, s-ro Alfandari mem, devis konfesi ke li akordiĝis por 95% kun nia prezidanto. La fondinto de "Neo" eĉ instigis la ĉeestantajn simpatiantojn de la ideo pri Internacia Lingvo, unue lerni Esperanton kaj nur poste, eventuale, ("se la problemo interesas ilin pli detale") pensi pri "Neo", por komparo. Feliĉan iniciaton prenis ankaŭ S-ro Maertens, organizinto de la t.n. "Karavano al la Suno", kiu kondukis multajn Esperantistojn al la Sofia Kongreso. La Jubilea Beneluksa Kongreso en Antverpeno fariĝis granda sukceso. Inter ĝiaj elstaraj atingiĝoj estu menciita esperanta disaŭdigilo. Estas eĉ nun preparoloj kun anglaj kaj francaj amikoj, por pli ofte kunveni kun belgoj, same kiel okazas en la trilandaj renkontiĝoj de germanoj kaj nederlandanoj kun belgoj. En Anderleŝt, la Erasma komunumo apud Bruselo, estis inaŭgurita nova D-ro Zamenhof-avenuo dum impona ceremonio. B.E.F. havis fine de

1963a, 580 registritajn membrojn en 11 lokaj grupoj. La starigo de novaj kernoj estas pristudata. La reto de la UEA — delegitoj kreskis ĝis 70. Ankaŭ la Junulara Sekcio pozitive evoluis; ĝi ekhavis novan estraron kaj sukcesis pli kaj pli interesigi la gejunulojn pri la movado.

4) **Brazilo.** Brazila Esperanto-Ligo. Nombro de membroj: 1.068. La reto de delegitoj, kiu kreskas kontentige atingas 167. Ĉirkaŭ 70 grupoj tra la tuta lando kaj precipe en la ĉefurboj korespondis kun B.E.L. en la lastaj kvin jaroj, sed kompreneble ne ĉiuj estas vere aktivaj kaj daŭraj: nur la triono de ili enskribis en la jaro siajn membrojn en la Movadon. Tri novaj grupoj estis fonditaj: en Itumbiara kaj en Jataí (Goíás) kaj en Vitória (Espírito Santo). Preskaŭ ĉiuj aktivaj grupoj funkciis kursojn, en kiuj enskribiĝis entute ĉirkaŭ 2.000 lernantoj. Krom tio B.E.L. havas kursojn per korespondado en tri gradoj — elementa, supera kaj profesora. Ankaŭ funkciis perradiaj kursoj. La diversaj registaroj daŭre montriĝis favoraj: la Prezidanto de la Respubliko oficiale donis permeson al la publikaj oficistoj, por ke ili ĉeestu la landan Kongreson sen perdo de salajro kaj de aliaj rajtoj; la Parlamento de Ŝtato São Paulo voĉdonis la Leĝon N. 7893 de la 9-a Majo publikigita de la Prezidanto de la Parlamento, laŭ kiu Esperanto estas enkondukita en la ŝtatajn mezajn lernejojn, la registaro de Guanabara subvencis B.E.L. — on kaj tiu de aliaj ŝtatoj kaj komunumoj faris la samon al lokaj grupoj; la komunumoj Agu (Rio Grande de Norte), Pompéu (Minas Gerais) kaj Cachoeira do Sul (Rio Grande do Sul) donis la nomon Esperanto al urbaj stratoj; kaj la komunumoj Macau (Rio Grande do Norte) kaj Niterói (Rio de Janeiro), kie jam ekzistis tiaj stratoj, transigis la nomon al pli belaj stratoj; la komunumo Santo Antônio (Rio Grande do Norte) donis la nomon D-ro L. L. Zamenhof al la Kunsida Ĉambro; la komunumo Volta Redonda rekonis kiel societon de publika utileco la lokan grupon. Okazis en Julio de Regionaj Kongresetoj: la VII-a Nordorienta Esperanto Kunveno, Teresina (Piauí) kaj la III-a Esperanto-Kunveno de Ŝtato São Paul, Santos. La XVIII-a Brazila Kongreso (Januaro 1964) estas vikle organizata en Fortaleza (Ceará)

estos la plej norda tutlanda kongreso ĝis nun okazinta: la serio de kongresoj iras regule norden, centron kaj suden. Fariĝis kutimo, ke la Prezidanto de la Organizaj Komitatoj de la Brazilaj Kongresoj estas la Rektoro de la loka Universitato: tio estas ankaŭ en la XVIII-a Kongreso. Radio-programoj audiĝis regule en Teresina (Piauí) 2, Rio de Janeiro 2, Volta Redonda kaj Resende (ŝtato Rio de Janeiro). Pluraj aliaj stacioj disradiis programojn nekonstantajn. Plie okazis 5 televidaj programoj. "Brazila Esperantisto" aperas regule trimonate. Ĝi estas sendata al ĉiuj membroj kaj havas plurajn abonantojn eksterlande. Laŭ plano de B.E.L. ĝi estos en 1964 dumonata. Brazila Klubo "Esperanto", en Rio de Janeiro, la plej malnova Esperanto-grupo en Latinameriko kaj eble en la kontinento havas konstantan paĝon pri siaj aktivecoj, kio estas imitinda de aliaj grupoj. Grupoj kun menciindaj laboroj estas ankaŭ Esperanto-Societo de Minas Gerais (Belo Horizonte), kiu havas Informan Servon pere de la gazetaro, Esperanto-Asocio de Rio Grande do Norte, (Natal), kiu forte laboras por la ekzistado de stratoj Esperanto en la teritorio, Paraná Esperanto-Asocio (Curitiba), kaj Esperantista Societo de Porto Alegre, kiuj agas ĉe librovendejoj por disvendo de esperantaj libroj. La Informa Servo de B.E.L. daŭre funkciis kun bona rezultato kaj ĝiaj komunikaĵoj estis favore akceptataj kaj publikigataj de gazetoj kaj radiostacioj tra la tuta lando. Allogaj kaj bone vizitataj ekspozicioj estis aranĝitaj ĉe la Regionaj Kongresetoj kaj ankaŭ en Uberlândia (Minas Gerais), Chapecó (Santa Catarina) kaj Rio Grande (Rio Grande do Sul). La Eldona Fondaĵo, lastatempe starigita de B.E.L. jam aperigis la du unuajn librojn. La Libro-servo disvolviĝas pli kaj pli kaj disvendas librojn de ĉiuj Esperantaj eldonistoj. São Paulo Esperanto-Asocio eldonis interesan diskon "Brazila Bird-simfonio". Konforme al la decido de la Federacia Konsilantaro de Edukado, kiu konsideris Esperanton kiel edukon praktikon, pluraj gimnazioj jam instruas Esperanton (en Rio de Janeiro, Instituto Copacabana). Kiel en antaŭaj jaroj B.E.L. pagis al la Akademio de Esperanto parton de la enspezo el donitaj diplomoj. Kvankam la Akademio konsideras la sumon kiel subvencion, la deziro kaj intenco de B.E.L.

estas, ke ĉiuj Landaĵ Asocioj kontribuu finance por la Akademio proporcie al la diplomoj.

5) **Britujo.** Brita Esperantista Asocio. Ni rimarkis kreskon de publika intereso pri Esperanto. Pluraj provincaj televidorganizaĵoj elmetis programojn pri Esperanto. Estis malgranda kresko rilate la lernejojn, en kiuj oni instruas Esperanton. Nia Asocio havis 1421 membrojn. La bedaŭrinda fakto daŭras, ke la plimulto de la esperantistoj ne estas membroj aŭ de la landa asocio aŭ de alia esperantista organizo. Sukcesa Brita Kongreso okazis en Hastings je Pentekosto: krome okazis en nia lando (Stoke on Trent, en Aŭgusto) la 15a Kongreso de la Internacia Federacio de Esperantistaj Fervojistoj. Ankaŭ organizita de la urbestro de Stoke on Trent estis la tria serio de intensivaj kursoj pri Esperanto por instruistoj, kiuj instigis grandan intereson ĉe la apuda Universitato Keele. Nia gazetara-koresponda Servo reorganizigis, ĝi sendis al ĵurnaloj 636 leterojn responde al kritikoj pri Esperanto, kaj almenaŭ 179 el la leteroj presigis. La Asocio de Blindaj Esperantistoj plilarĝigis sian kunlaboron en enlandaj blindul-institucioj.

6) **Bulgarujo.** Bulgara Esperantista Asocio. Nombro de la membroj — 5771, lokaj societoj — 140 (97 urbaj kaj 43 vilaĝaj). Dum la jaro 1963 estis organizitaj 385 kursoj por komencantoj kun 7400 partoprenantoj. Por progresintoj estis malfermitaj 90 kursoj kun 940 kursanoj. La organo de la Asocio "Bulgara Esperantisto" aperis en 3000 ekz. ĉiumonate. La ilustra riĉenhava revuo "Nuntempa Bulgario" estis eldonita en 8000 ekz., ĉiumonate kaj bone akceptita en pli ol 80 landoj. En 1964 la revuo ŝanĝis sian nomon — ĝi aperos kun la nomo "Bulgario". En la komenco de 1964 aperos ankaŭ la revuo "Ripozoj" kun enhavo pri la kuraĉlokoj en Bulgario. Radio Sofio daŭrigas la 25-minutan disaŭdigon en Esperanto ĉiudimanĉe, dufoje en la sama tago. Dum la jaro estis organizita en Sofio la 48-a Universala Kongreso de Esperanto, vizitata de 3500 delegitoj kaj gastoj el 45 landoj. La Komitato de la demokrataj virinoj en Bulgario eldonis por la Kongreso specialan numeron en 1000 ekz. de la revuo "Bulgarino", kiun oni disdonis al la kongresaninoj. La Kongreso pasis

bone kaj kontribuis efike por la propagando de la movado en la larĝaj tavoloj de la bulgara socio. En 1963 la Stata eldonejo "Naŭka i izkustvo" eldonis en 20.000 ekz. la lernolibron de Ivan Sarafov kaj Simeon Hesapĉiev, Esperanto-Bulgaran vortaron de Ivan Sarafov, Dmitr Simeonov, Kiril Georgiev, Simeon Hesapĉiev, Georgi Dimov en 10.000 ekz., Esperanto-Bulgaran konversacilibron en 6.000 ekz. En 1963 en Bulgario aperis la jenaj esperantaj gazetoj: "Bulgara Esperantisto", "Nuntempa Bulgario", "Internacia Ĵurnalistoj". En 1963 oni organizis "Tutlandan Junularan Balo-Festivalon" en urbo Varna, vizitata de 950 junaj esperantistoj el la tuta lando. La Balo-festivalo jam fariĝis tradicia. La esperantista junularo estas tre aktiva — oni malfermas kursojn en diversaj lernejoj, en la domoj de la ĵunpioniroj, junularaj organizaĵoj ktp. Oni instruas la lingvon en la universitatoj de Sofio, Sviŝtov kaj Varna kiel enprograma nedeviga lernobjekto. Dum la 48-a Kongreso oni solene inaŭguris la montodomon "Esperanto" sur Vitoŝa — monto apud urbo Sofio. Ĉe la Asocio funkcias Bulgara Amatora Esperanto-Kinoklubo kun kino-foto kaj magnetofona servoj: en la klubo membras deko da fakuloj, kiuj daŭre lernas kaj perfektigas en la lingvo. La Bulgara Amatora Esperanto-Kinoklubo organizis dum la 48-a Kongreso Internacian foto-ekspozicion je temo "La homo" kaj konkurson kun sufiĉe granda sukceso. La Klubo filmadis ankaŭ la 48-an Kongresan kaj preparis specialan filmon "La 48-a en Verdstela Sofio". La Bulgara Esperantista Kooperativo daŭre funkcias. Ĝi sukcese disvastigas esperantan literaturon per siaj 14 magazenoj en Sofio.

7) **Danlando:** Centra Dana Esperantista Ligo. La unuan de januaro 1964 ni havis 1004 membrojn en 40 kluboj, krome 5.000 kolektivajn membrojn (La Dana Asocio de Unuiĝintaj Nacioj). Nia monata gazeto: Dansk Esperanto-Blad aperis en ĉ. 1100 ekzempleroj kun 126 paĝoj (11 numeroj). Ni aranĝis 30 kursojn kun 350 lernantoj, unu korespondan kurson kun 16 lernantoj krome 4 unu-semajnajn kursojn somere kun 90 lernantoj kaj 4 unu-semajnajn kursojn aŭtune kun 60 lernantoj. La landa kongreso okazis en Kolding kaj la kongreso 1964 okazos en Svendborg. Nova danlingva propagandgazeto aperis en



oktobro 63: Esperanto-Nyt, ĝi estas senpage disdonita al multaj diversaj personoj, institucioj ktp. Rezulto: multaj informpetoj, aliĝoj al kursoj ktp.

8) **Francaĵo.** Unuiĝo Esperantista Franca. Propagando: La plej grava propagando estis tiu de A. Ribot, kiu faris 84 prelegojn en 44 ŝtataj lernejoj, antaŭ 5700 lernantoj. La grupo de Montpellier prenis sola la riskon inviti du japanajn samideanojn, S-rojn Deguchi kaj Umeda. Plie, Profesoro Pragano de la Universitato de Amsterdamo faris plurajn paroladojn. Mirinda estas la sukceso de la nuklea fako gvidata de S-ro J. Detwiller, kiu konsistas el 56 membroj. Ĝi bone propagandas E-on en tiu scienca medio, organizis 3 kursojn kaj unu ekspozicion. La grupo de Montelimar, Romans kaj Valence, kiuj kune kunlaboras, invitis anglan instruistinon, S-inon Major, por fari kurson dum tri monatoj en la tri urboj samtempe. Entute, ŝi havis 45 lernantojn, kiuj fidele sekvis la kursojn. Prezidanto de UEF faris en la regiono de Perpignan multajn kursojn ĉe seminarioj, liceoj, kolegioj, ktp. . . . antaŭ pli ol cent gelnantoj. La urbo Perpignan ĝemeliĝis kun la urbo Hanover (Germanujo) kaj la Esperantistaj grupoj ankaŭ ĝemeliĝis. Kiel ĉiujare oni festis la datrevenojn de d-ro Zamenhof kaj de la Universalaj Homaj Rajtoj. La trimonata bulteno "Sudfranca Stelo" regule aperas kaj entenas nun la bultenon de la lernejoj Esperantaj kluboj. Dum la pasinta jaro okazis 163 prelegoj kun 8.630 ĉeestantoj 34 radiodissendoj, 3 televidaj dissendoj. Estis organizitaj en tiu tempo 20 ekspozicioj, kiujn vizitis 24.000 vizitantoj.

Eksteraj Rilatoj. UEF havis viglajn rilatojn kun diversaj neesperantistaj asocioj. Ekzemple S-ro Olivaux el Nantes forte agadis ĉe la franca iluziista movado kaj eĉ faris debaton en la gazeteto. S-ro H. Chaisnot kreis grupon ĉe la Radio-amatoroj, kaj esperanta kroniko aperas ĉiumonate en la gazeto Radio R.E.F. Jack Rousseau daŭre rilatas kun la filatelaj asocioj, kiuj aperigas artikolojn en la faka revuo. S-ro Genermont persisteme laboras ĉe la Rotary-movado. S-ro Retot ĉiam propagandas por la turismo en Francaĵo, Profesoro Gerard por la geografia fako, Inĝeniero Broise por la scienco.

Instruado. En 1962-63 okazis: En 71 lernejoj (ĉefe dua-

gradaj) 87 kursoj kun 1.516 gelnantoj (el kiuj 14 instruist(in)aj seminarioj); 18 kursoj = 375 gelnantoj. Ekster la lernejoj: En 31 urboj — 41 societoj — 54 kursoj — 459 gelnantoj. En la komenco de la nova lernojaro (1963-64) ni sendis al ĉiuj Akademaj Inspektoroj (90), direktor(in)oj de Instruist(in)aj Seminarioj (ĉ. 150), inspektoroj de unuagrada kaj meza lernejoj (ĉ. 600) la jenan dokumentaron:

a, la statistikon pri Esp. kursoj en la francaj lernejoj, b, la presitan raporton pri la Kultura Semajno 1963 en Gresillon, c, leteron por peti konsentan sinfenon al kompetentaj esperantistoj, kiuj proponus malfermon de Esp. kursoj en novaj lernejoj.

Kultura Semajno. Ĉeestis entute ĉirkaŭ 100 partoprenantoj, el kiuj 51 stipendiuloj de UEF; 46 el 11 instruist(in)aj seminarioj. Prelegis 2 eksterlandanoj (Profesoro Lapenna, Inĝeniero Michling), 13 francaj instruistoj — aktivuloj de la enlanda movado, kvarpaĝa raporto presita kun foto aperis en 5.000 ekzempleroj por diskonigo inter edukaj instancoj, lernejestroj, gepatroj . . .

Franca Instituto. La Instituto disdonis la sekvantajn diplomojn: lerneja 193, supera 53, kapableca 10, pedagogia 2, sume: 258.

Franca Esperantisto. Post longa studado, en la kadro de la budĝeto, ni decidis eldoni 4 presitajn numerojn kaj 5 aŭ 6 ofsetajn. La abonantoj kreskis je 10%.

Gazetara servo. Kiel kutime, ni sendis artikolojn al la gazetoj, kiuj regule bonvolas aperigi ion pri Esperanto. La grupoj sukcesis aperigi anoncojn pri lokaj aktivecoj. S-ro Motillon raportis, ke li ricevis de niaj membroj 442 eltranĉaĵojn el gazetoj kaj revuoj, koncernantajn la internacian lingvon. Estas reala progreso kompare kun la antaŭa jaro (preskaŭ unu cento pli). Krome, estis 4 malfavoraj artikoloj, al kiuj lertaj korespondantoj forte skribe reagis. Ni estas tre kontentaj pri la favora evoluo, kaj pli kaj pli la vorto Esperanto fariĝas sinonimo de internacia lingvaĵo aŭ komprenilo. Niaj grupoj anoncis 549 artikolojn, 544 informojn, 285 anoncojn.

Nacia Kongreso. Malgraŭ la necentra situacio de Perpignan, nia nacia kongreso bonege sukcesis. 250 personoj ĉeestis la Kongreson.



Membraro. La membrostato en la pasinta jaro estis 2.315.—

Kulturdomo. La Kastelo de Gresillon bone prosperas. Dum la jaro, 735 personoj ĉeestis la diversajn manifestaciojn. El ili, estis 26 infanoj kaj 108 eksterlandanoj de 13 nacioj. La revuo "Kulturaj Kajeroj" aperis regule.

Stratoj Zamenhof. Nia lando, kiu jam havis stratojn kun la nomo de D-ro Zamenhof, ricevis du novajn en 1963. La unua estis inaŭgurita de la Normanda Federacio en Evreux, dum julio. La urbo Montelimar poste, same sukcesis.

Malgraŭ la opinio de kelkaj membroj kiuj restas pesimistaj pro stagnado de la grupaj aktivecoj, ni povas diri ke la jaro 1963 alportis elementojn al nia grava konstruado. Pli kaj pli la oficialaj instancoj komprenas la gravecon de nia movado kaj por influi ilin ni devas aliĝigi konstante novajn personojn.

9) **Germanujo.** Germana Esperanto-Asocio. Fine de 1963 GEA havis 2.050 membrojn, 93 lokajn grupojn kaj 8 landajn ligojn. GEFA (fervojistoj) kaj EBLOGO (blinduloj) estis aliĝintaj al GEA. Meze de la jaro estis starigita nova Centra Oficejo en Nürnberg, kiu plenumas ĉiujn administraciajn laborojn. En marto la Estraro de GEA akceptis la Laborplanon ellaboritan laŭ la 2a Baza laborplano de UEA (publikigita en GER septembro 1963). La oficiala organo de GEA "Germana Esperanto-Revuo" aperis 11-foje kun po 12 paĝoj. Dum la jaro funkcis Gazetara kaj Radio-Servo, kiu registris ĉ. 2.200 publikaciojn en la germana gazetaro. Okazis 68 prelegoj por la ne-esperantista publiko kun 3079 ĉeestintoj kaj 23 ekspozicioj kun 8.730 vizitantoj, speciale menciinda estas la partopreno kun Esperanto-stando en la 7a Didacta (foiro por lerniloj) en Nürnberg. Estis aranĝitaj 90 Esperanto-kursoj, parte en popolatlernoj. Ankaŭ en kelkaj germanaj lernejoj elementaj Esperanto estis instruita liberevole. 300 esperantistoj el 10 landoj partoprenis la 41an Germanan Esperanto-Kongreson en Würzburg, la 10-13.5.63. Okazis 9 ligaj kunvenoj kaj kun eksterlandaj E-organizaĵoj 2 internaciaj renkontiĝoj. La 7a Jarkunveno de Germanaj Esperantistaj Fervojistoj unuigis 176 personojn, sur

"Kniebis" kunvenis la naturamikaj esperantistoj. Kun subteno de la kulturministerio de Malsupra Saksujo okazis denove studsemajno de la esperantistaj instruistoj en la kulturministeria hejmo Rinteln. GEA organizis prelegvojaĝon de s-ano Lutognewski, Varsovio, pri Pollando en la sudo kaj okcidento de la Federacia Respubliko Germanujo. Krome prelegis s-anoj Deguchi kaj Umeda el Japanujo en Bad Kissingen (200 ĉeestintoj), Fulda kaj Hamburg, GEA partoprenis en la celebrado de la universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj kombine kun la Zamenhof-Festoj. Estis preparitaj la manuskriptoj por nova ampleksa varbbruŝuro, kiu aperu 1964. Specialaj informaj kampanjoj estis direktitaj al la sindikatoj kaj lernejoj instancoj. Estis eknomita nova "Zamenhof-Strato" en Welper/Ruhr, aperis nova urba prospekto en Bielefeld. La kontaktoj al la registaraj instancoj estis daŭrigataj, la ministerio por eksteraj aferoj petis pri detala raporto. La "Okcident-Germana Revuo" aperis 6-foje en eldonkvanto de 20.000 ekzempleroj. La someraj kaj vintraj eldonoj de la oficialaj horaro kaj horareto por longaj distancoj de la Germana Federacia Fervojo enhavis klarigojn en Esperanto. Fine de la jaro ekaperisleterkurso en la loka gazeto de Oberkirch. Aperis ankaŭ regule la germanlingva informilo presita "Der Trichter — La Funelo" kvarfoje po 1000 ekzempleroj.

La Germana Esperanto-Junularo, la junulara sekcio de GEA, organizis en 1963 la 8an Internacian Junular-Kunvenon sur Feldberg, Landliman Renkontiĝon en Passau kaj denove la tradician internacian seminarion de GEJ. Pli ol 100 gejunuloj el 17 landoj partoprenis la 7an seminarion en Pullach apud Munkeno sub la temo "Eŭropa Kulturo — ĉu Unueco en Varieco?". Por tiuj renkontiĝoj kaj por la partopreno de siaj membroj en internaciaj aranĝoj GEJ ricevis konsiderindan ŝtatan subvencion. Estis flegitaj kaj pliintensigitaj la kontaktoj kun eksterlandaj junular-organizaĵoj esperantistaj. Komenĉiĝis kunlaboro kun germana societo por internacia junularintersanĝo. La Informa Fako de GEJ eldonis du numerojn de germanlingva multobligita informilo "international" senditaj speciale al germanaj junular-organizaĵoj. Kun financa subteno de GEA estis eldonita flugfolio

ilustrita de GEJ en eldonkvanto de 100.000 ekz. La Germana Studenta Esperanto-Ligo farigis sekcio de GEJ/GEA.

Esperanto estis reprezentita iel ĉe tri internaciaj foiroj krom la jam menciita 7a Didacta. Ĉe la Anuga en Köln (ekspozicio por nutraĵoj kaj luksnutraĵoj) ĉefurbestro Buraen parolis en Esperanto dum akcepto de eksterlandanoj, ĉe la 15a Frankfurta Libro-Foiro estis Esperanto-Stando de Limburger Vereinsdruckerei kaj ĉe la Internacia Foiro por Ludiloj en Nürnberg afiŝoj kaj indikoj en la katalogo atentigis pri Esperanto.

10) **Hispanujo.** Hispana Esperanto Federacio, konsistas el ĉirkaŭ 700 membroj. Apartenas al HEF-sekcioj nur 5: Fervoja, Organizis novajn E-grupojn en Alar del Rey kaj Villafranca de Oria; eldonis kaj disdonis inter siaj membroj fervojistaj kaj neesperantistaj 4000 flugfoliojn. Ankaŭ atingis de la Fervojistaj aŭtoritatoj plenan helpon koncerne la eldonadon de Fervojistaj Informoj por la turistoj en Esperanto. Junulara: Sukcese organizis la 2-an Hispanan E-Junularan Kongreson en la kadro de la 24-a Hispana Kongreso en Barcelono. Delegis reprezentanton al la 7-a Internacia Seminario en Munkeno kaj je la fino de la jaro luis propran sidejon en Barcelono.

Informoficejo: trimonate regule sendis informojn al ĉiuj radiostacioj kaj ĵurnaloj, kaj atingis sukcese la publikadon de kelkaj informoj de I.G.S. en la plej gravaj ĵurnaloj.

Libroservo: Tiu sekcio daŭrigas sian funkciadon, tre bone zorgata de eminenta Esperantisto. Koresponda Kurso: Kiel en la antaŭa jaro ĝi funkciis tre bone kaj atingis pli malpli 100 lernantojn.

La Esperanta agado ĝenerale estis bona kaj oni atingis bonan sukceson. La plej brila E-arango estis la Hispana Kongreso, kiu okazis en Barcelono, organizita de Hispana Esperanto Instituto, en kiu partoprenis 500 esperantistoj, la plej granda partoprenado el ĉiuj E-Kongresoj. Ankaŭ tre brila estis la 5-a Barcelona-Provinca Esperantista Renkontigo en Igualada kun ĉirkaŭ 300 esperantistoj. Ankaŭ en Alar del Rey okaze de la inaŭguro de la grupo ĉeestis 150 esperantistoj. H.E.F. kaj ĝia junulara sekcio H.E.J.S. eldonis regule sian dumonatan bultenon, ankaŭ H.E.I. kaj la E-grupoj de Tarrasa, Sabadell, Madrido kaj Bilbao eldonis neregule ankaŭ bultenojn.

11) **Hungarujo.** Hungara Esperanto-Asocio. Hungara Esperanto-Asocio havas 2300 membrojn, 96 lokajn grupojn. En la jaro 1963 okazis 102 kursoj kaj finis ilin 2.043 personoj Ĉiumonate la hungara Radio publikigas unufoje aktualaĵojn pri E. Proksimume 500 artikoloj aperis en la diversaj hungaraj gazetoj, fakorganoj, ktp. Diversaj turismaj oficejoj eldonis prospektojn en Esperanto. Duan fojon oni aranĝis la "Someran Esperanto Universitaton" en la urbo Gyula. Ĝi havas internacian karakteron nome ankaŭ 2 eksterlandaj prelegantoj partoprenis en ĝia programo. Ekspozicio okazis en ses lokoj. Aperis 4-a eldono (8000 ekz.) de "Esperanto Lernolibro" de J. Baghy. Daŭre estas kvaronjare eldonitaj la "Hungara Vivo" (3000 ekz.) — la "Hungara Esperantisto" (2300 ekz.), kaj la "Hungara Fervojista-Mondo" (1000 ekz.). En Oktobro 1963 la Ministro de Klerigado donis permeson por la lerneja instruado de E. en la ĝeneralaj kaj mezgradaj lernejoj. Krome Esperanto estas instruata en du universitatoj. Memortabulo estis inaŭgurita — en la stalaktitgroto de Aggtelek. La inaŭguro okazis dum la vizito de Sro. K. G. de Jong prezidanto de IFEF. La Fervojista Fako de HEA aranĝis la dusemajnan feriadon laŭtradician — kun E. seminario — en Balatonkenese (Majo 1963). Inter la partoprenintoj (ĉ. 150 pers.) ĉeestis ankaŭ nefervojistaj esperantistoj.

12) **Israelo.** Esperanto-Ligo Israela. En la Ligo estas registritaj pli ol 300 personoj, deklarintaj sin kiel esperantistoj. La esperantista vivo koncentriĝas precipe en Tel Aviv kaj Haifa. La kunvenojn en Tel Aviv kaj Haifa kutime partoprenas personoj el proksimaj urboj kaj lokoj. Oficiala organo de la Ligo multobligita (stencilita) "Nia Ligilo" aperis kvarfoje dum la jaro. En ĉiusemajna populara enciklopedio por junularo "Tarbut" aperis tripaĝa bele ilustrita artikolo pri Zamenhof kaj Esperanto. En la 16a volumo de la granda hebrea enciklopedio aperis artikoleto pri Zamenhof kune kun la portreto. Oni povas konstati kreskon de interesiĝo pri la lingvo internacia en la israela gazetaro. Ankaŭ en Radio kreskis interesiĝo pri Esperanto. Laste en ĉiuj lingvoj de la disaŭdigoj de "Kol Israel" (Voĉo de Israelo) aperis informo pri la konstruota monumento al Zamenhof en Bjalistoko.

Menciindaj estas kelkaj artikoloj aperintaj en la instruista gazeto "Hed Haĥinuh". Kulturaĵaj fakoj de la urbestroj en Kfar Saba kaj Petan Tikva presigis afiŝojn pri kursoj de Esperanto, ankaŭ kulturaj fakoj de "Histadrut" — profesiaj sindikatoj, presigis afiŝojn pri la kursoj en Jerusalemo kaj Kfar Ata. Dank'al interveno kaj penadoj de la Centra Komitato de la Ligo Departemento de Edukado de la Urbestro en Tel Aviv dissendis al ĉiuj urbaj gimnazioj cirkuleron laŭ kiu povas okazi kursoj de Esperanto en specialaj rondoj, se troviĝos konforma nombro de lernantoj. Ankaŭ la cirkulero petis informojn, ĉu troviĝos instruistoj dezirantaj studi la lingvon en specialaj dumsomeraj kursoj. Dank'al klopodoj de la CK de la Ligo en Ministerio por Eksterlandaj Aferoj dum la Universala Kongreso en Sofio la unuan fojon Israelo estis oficiale reprezentita. La CK de la Ligo sendis vastajn memorandojn pri Esperanto kaj ĝia apliko al la Ĉefministro, Ministroj de Eksterlandaj Aferoj, Edukado kaj Financoj.

La CK de la Ligo provis kontakti afrikajn studentojn en Israelo kaj aranĝi por ili prelegojn pri Esperanto en la angla kaj franca lingvoj. Al la redakcio de la afrikana studenta ĵurnalo estis sendita broŝuro de UEA kaj alia materialo.

13) **Italujo.** Itala Esperanto-Federacio nombris dum 1963 ĉ. 1400 membrojn organizitajn en 51 lokaj societoj. Fondiĝis tri novaj Esperanto-Grupoj en Cagliari, Rimini kaj Lovere (Brescia). La eldona aktiveco de I.E.F. resumiĝas laŭ jenaj ciferoj: Nia oficiala organo "L'Esperanto" aperis 6 foje kun 20 + 24 paĝoj (eldonkvanto 1900 ekzempleroj); multobligita pres-bulteno "Notiziario Internazionale" aperis 12 foje kun 4 + 6 paĝoj (eldonkvanto 1800 kopioj), kaj estis sendita al italaj gazetoj, ĵurnalistoj, parlamentanoj, lernejoj instancoj, ktp.; kvarpaĝa flugfolio en itala lingvo estas eldonita en 3000 ekzempleroj kaj utiligata por informi la eksteran publikon pri Esperanto. Laŭ eldona vidpunkto, la plej grava okazintaĵo en 1963 estis la "Dia Komedio" de Dante en Esperanto, al kies realigo kontribuis pluraj membroj de nia Federacio. En la kampo de instruado, 39 kursoj de Esperanto okazis en 21 urboj. Bedaŭrinde ne ĉiuj geinstruistoj priatentis

la alvokon de C.E.D., presitan en nia revuo. Tial, la koncerna lerneja statistiko, rilate al Italujo, estas nekompleta. Aliaj gravaj atingoj dum 1963 estis la starigoj de Esperanto-stratoj en 3 urboj: Porto Empedocle, Voghera kaj Cerro Veronese. Plie, Esperanto havis propran standon en la ĵara Foiro de Bologna kaj dum la 40-a Internacia Foiro de Padova, Esperanto-interpretistoj estis je dispono de la vizitantoj. En tiu okazo, estis disdonitaj 13.000 flugfolioj pri nia lingvo. El inter la regionaj manifestacioj, menciindaj estas la kunvenoj en Porto Empedocle (starigo de Esperanto-strato), Mantova (5-a Esperanto-tago), Modena (3-a interregiona kunveno), kaj Albano Laziale (Romo), kie okazis impona lerneja manifestacio kun ĉeesto de ministeriaj reprezentantoj. En la kadro de la Junulara Ĵaro oni aranĝis tutlandan organizan kunvenon en Bologna kaj oratoran konkurson dum la nacia Kongreso. La XXXIV Itala Kongreso de Esperanto okazis dum septembro en Saint-Vincent (Aosta Valo), kun ĉeesto de 350 personoj, el kiuj 38 eksterlandanoj.

14) **Jugoslavio.** Jugoslavia Esperanto-Ligo. Aktivas 85 societoj kaj pluraj lernejoj grupoj, 6 distriktaĵoj, 1 regiona kaj 6 respublikaj komitatoj. En kadro de JEL funkcias jenaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj: JAFE (Jugoslavia Asocio de Fervojistoj Esperantistoj), membro de IFEF; JAPE (Jugoslavia Asocio de Pedagogoj Esperantistoj), membro de ILEI; JEJA (Jugoslavia Esperantista Junulara Asocio), membro de TEJO; JEMA (Jugoslavia Esperantista Medicinista Asocio), membro de UMEA, kaj Jugoslavia Esperanto-Instituto kun 4 apartaĵoj: lingvistiko, instruado, literaturo kaj historio. En kadro de Administrativa Komitato de JEL funkcias komisionoj por: informado, dokumentado, eldona aktiveco, kultura aktiveco, internaciaj rilatoj kaj ideologia laboro. AK de JEL havas ankaŭ Gazetaran Servon. La oficiala organo de JEL "Jugoslavia Esperantisto" aperadis dumonate en 2.000 ekzempleroj. Regule aperas ankaŭ "Jugoslavia Fervojisto", "Homo kaj kosmo" (popularscienca revuo de Astronomia Observatorio en Zagreb), "Kajeroj" (organo de Jugoslavia Esperanto-Instituto), Nacilingva Informbulteno de JEL sendata al diversaj informagentejoj,

naciaj gazetoj, sociaj organoj kaj organizaĵoj. Aperas ankaŭ pluraj internaj bultenoj en Esperanto. En 141 lernejoj Esperanto estas instruata al pli ol 4.000 geler-nantoj. Sub aŭspicio de Jugoslavia Nacia UNESCO-komisiono, inter la 28-a de julio kaj 1-a de aŭgusto 1963 okazis en Beograd Internacia Konferenco de la lernejoj en kiuj Esperanto estas instruata. La Konferencon observis reprezentantoj de Jugoslavia Nacia UNESCO-komisiono, Federacia Konsilantaro por klerigo kaj kulturo de Jugoslavio, Jugoslavia Instituto por esplorado de lernejoj aferoj kaj multaj aliaj, ĝin partoprenis 260 geinstruistoj kaj profesoroj el 20 landoj. Dum la Konferenco estis prezentitaj 20 fakaj referaĵoj kiujn pridis-kutis 147 diskutintoj. Estis 4 rezolucioj kaj multaj valoraj konkludoj. Modelan instruhoron dum la Konferenco partoprenis 24 infanoj el 9 landoj. La ekspozicion "Espe-ranto en la servo de la edukado" vizitis 10.000 personoj. Ĉirkaŭ 50 partoprenintoj de la Konferenco donis sangon por la viktimoj el Skopje. En la 1963-a jaro estis organ-izitaj 2 gravaj seminarioj por pedagogoj en Zagreb kaj Iliga. En Primošten estis organizita STELO-semajno. En Sombor Esperanto estas enkondukita en la progra-mon de la Laborista Universitato. En Zagreb funkcias kurso por aziaj kaj afrikaj studentoj. En diversaj E-so-cietoj kaj grupoj funkcias multaj kursoj. Ĉiujaude Radio Zagreb disaŭdigadis entute 52 radiodissendojn kiuj daŭris 17 horojn. Ankaŭ Radio Beograd komencis disaŭdigi la saman programon. Kelkaj jugoslaviaj radiostacioj dis-aŭdigis plurajn nacilingvajn propagandajn radiodissen-dojn pri Esperanto el kiuj plej interesa kaj sukcesa estis la 45-minuta radio-raportajo pri TEJO-Kongreso en Vra-ca (Radio Beograd). Kunlabore kun Jugoslavia Stata Loterio JEL organizis grandan loterion kun multaj va-loraj premioj (aŭtomobilo "Zastava", televidaparatoj, radioaparatoj, mongajnaĵoj ktp.). La profito por JEL: 1,300.000 din. E-societo en Ljubljana ankaŭ organizis grandan tombolon. En Sremski Karlovci estas fondita Esperanto Muzeo. En Strumica (Makedonio) unu el ho-teloj ricevis nomon "Esperanto". La nomon "Esperanto" ricevis ankaŭ unu el stratoj en Slavonski Brod. Oni daŭre plifirmigas la ĝemeligaĵn interrilatojn Novi Sad (Jugoslavio) —Mirandola (Italio). Esperantista Junulara

Kulturarta Societo "Ivo Lola Ribar" el Jezeznik (apud Beograd) daŭre atingas gravajn sukcesojn propagan-dante Esperanton. Ĝi organizis multajn aranĝojn en la lando kaj eksterlando (Bulgario). Ĝian aranĝon en im-pona Sindikata Domo en Beograd ĝuis 2.500 rigardantoj kaj la similan aranĝon ekstersalonan en Jezeznik ĉeestis 22.000 personoj. Same sukcese aktivas Drama Grupo en Zagreb kaj Junulara E-kantfloro en Ljubljana. Inter-nacia E-kampadejo "Ivo Lola Ribar" en Primošten rapide kreskas kaj fariĝas grava turista loko kaj alloga espe-rantista renkontiĝejo. La ŝtato helpis ĝis nun la evoluon de tiu kampadejo per grandega sumo (200 milionoj da dinaroj). En Bela Palanka (Serbio) fondita nova E-kam-padejo ĉe montaro. Unu granda montrofenestro en la centro de Beograd konstante servas por E-ekspoziciaĵoj. Dum tn. Nacia Libro-Monato en Beograd estis vendataj E-libroj surstrate. Estas faritaj nova E-insignoj kaj presitaj glumarkoj por aerpoŝtaj sendaĵoj "Aerpoŝte". Por presado estas pretaj: La verko de la Nobelpremiito Ivo Andrić "Ponto super Drino" kaj "Eterna Vojaĝanto" (pri Ivo Lola Ribar — popolheroo — esperantisto). Beo-grada E-societo "Radomir Klajić" festis la 10-jaran jubi-leon de sia ejo kaj Regiona Komitato por Vojvodino — la 50-jaran jubileon de Esperanto movado en tiu provinco. La Tagon de Unuiĝintaj nacioj kaj 15-an Datre-venon de la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj festis pli ol 30 societoj per prelegoj kaj diversspecaj programoj. Ĉiuj E-societoj kaj grupoj festis 20-jaran Jubileon de AVNOJ (faritaj fundamentoj de la nova Jugoslavio) kaj Zamenhofan Tagon. Pri aktiveco de jugoslaviaj esperantistoj nacilingvaj gazetoj aperigis pli ol 410 artikolojn kaj informojn pri Esperanto. JEL kon-stante kunlaboras kun Socialista Unuiĝo, Jugoslavia Insti-tuto por esplorado de lernejoj aferoj, Jugoslavia Nacia UNUESKO-Komisiono, Federacia Konsilantaro por kulturo kaj diversaj sociaj organoj kaj organizaĵoj. Ankaŭ pli-multo de E-societoj havas kontakton kaj kunlaboras kun diversaj institucioj kaj sociaj organizaĵoj sur teritorio de sia komunumo.

15) **Monako.** Monaka Esperantista Grupo. En la Princ-lando MONAKO estas nur unu grupo kiu havas 40



membrojn. En la loka gazeto "La Gazette de Monaco" estas publikigita granda artikolo francelingva dufoje monate dum la tuta jaro. Okazis unu prelego propagandela por la junuloj. Partopreno al Filatelie Ekspozicio per preskaŭ kompleta serio de Esperantaj poŝtmarkoj. Aperis dudeko da malgrandaj artikoloj en la lokaj tagjurnaloj.

16) **Nederlando.** Nederlanda Esperanto-Asocio: L.E.E.N. (La Estonto Estas Nia). La nombro de sekcioj je 1-1-64 estis 24 kaj tiu de la membroj 855; ni havis 269 donacantojn. La sekcioj organizis 30 kursojn kun proks. 274 partoprenantoj. Krome okazis 2 gazetkursoj kun entute 570 partoprenantoj kaj speciala kurso kun S-ro Mag. Pragano kiel gvidanto en la konata "Anne Frank-domo, Amsterdam. La fondaĵo: "Esperanto ĉe la Instruado" kunlaboris kun ĉiuj unuigoj de instruistoj, aranĝis prelegojn, eldonis nacilingvan propagandan gazeton kaj klopodis enkonduki Esperanton en la lernejojn. Speciala komitato elverkis skriban kurson por instruistoj por akiri ŝtatan instru-diplomon. Ne atendante la oficialigon de tiu diplomo, jam kelkaj geinstruistoj abonis la kurson. La Centra Komitato por Esperanto regule sendis artikolojn kaj sciigojn al la gazetaro. La disvastigo de la propaganda broŝuro daŭras. Dum la Pentekostaj tagoj ni partoprenis en Beneluksa Kongreso en Antwerpen. Haarlem aranĝis sukcesplenan ekspozicion, kiun vizitis proks. 500 personoj. La sekcio Krommenie denove aranĝis la jam famkonatan "Internacian Esperanto-Ferio-Semajnon". Dum la monato septembro niaj japanaj amikoj, S-roj Deguchi kaj Umeda prelegis en diversaj kluboj kaj prezentis parton el la Nodramo kun akompano de antikva fluto kaj planktamburo. Junularsekcio de Radio-Unuigo disaŭdigis intervjuon kaj parton de la muziko. Nia gazeto: "Nederlanda Esperantisto" regule aperis unu fojon en la monato, krome regule aperas la sekciaj komunikiloj. Diversaj kluboj invitis eminentulojn por prelegi kun diapozitivaj. Speciala evento estis la "forumoj", kiujn formis la kvar eksterlandanoj, laborantaj ĉe la Centra Oficejo de U.E.A., en diversaj klubvesperoj, dirante sian opinion pri nia lando kaj popolo. Ke Esperanto ankaŭ havas la atenton de oficialuloj, pruvas la represo en Esperanto de la faldprospekto "Nederlando", eldono

de la unuigo "Nederlando en Eksterlando".

17) **Norvegujo.** Norvega Esperantista Ligo. Je la fino de 1963 Norvega Esperantista Ligo havis 22 lokajn grupojn kaj sume 611 membrojn. La membrogazeto "Norvega Esperantisto" regule aperadis dum la jaro en 1000 ekzempleroj. Okazis en la lando 9 kursoj kun proks. 80 partoprenantoj. La korespondaj kursoj havis proks. 100 novajn lernantojn. Plie unu ĵurnalo aperigis kurson. 2 personoj plenumis la elementan kaj 1 persono la superan ekzamenon. La Gazetara Servo dissendis 37 artikoletojn al ĉiuj norvegaj taggazetoj kaj registris 578 aperojn en 103 gazetoj. La nacilingva informgazeto "Esperanto-nytt" aperis per 3 numeroj kaj estis ĉiufoje dissendata en 10.000 ekzempleroj, i.a. al granda nombro da lernejoj. Aperis granda Norvega-Esperanta vortaro de R. Rian kaj E. A. Haugen. Du kopioj de la filmo "Bonvenon al Oslo", eldonita de la Turistrafika Asocio de Oslo, cirkulas en la mondo. N.E.L. okazigis landan kunvenon en Stavanger. Tiu kunveno i.a. sendis rezolucion al ĉiuj norvegaj esperantistaj instruistoj kaj lektoroj kun propono ke ili klopodu ekhavi permeson eksperimente instrui Esperanton en siaj lernejoj. La landa kunveno plie starigis finanĉan komisionon, kiu klopodu akiri el neesperantistaj fontoj ekonomian subtenon al la laboro por Esperanto.

18) **Nov-Zelando.** Senĉese dum la jaro funkciis la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (379 membroj) kune kun sia ĉeno da tridek-kelkaj kluboj kaj grupoj, kiuj etendiĝas de la nordo ĝis la sudo de nia anglalingva lando. Sep novaj kluboj starigis dum la jaro, kiuj kune kun la ceteraj daŭre gvidis instruadon de E-o.

Al ĉiuj kluboj NZEA sendis serion da interesaj alineoj raportantaj sukcesojn alilande, petante, ke la loka komitato nepre sendu ĉiusemajne unu alineon al la loka gazetaro. Diversaj kluboj aranĝis, ekspoziciojn kun esperanta materialo en montrufenestroj kaj bibliotekoj. La oficiala organo de NZEA, la "New Zealand Esperantist", aperis sesfoje dum la jaro kaj nacilingve pro propaganda valoro aperigis alineojn pri enlandaj aferoj kaj esperantlingve pri la plej lastaj libroj, gazetoj, ktp. En nia lando Esperanto estas oficiale rekomendita de la Eduka Fako kiel



studobjekto.

Fine de 1963, almenaŭ 22 lernejoj instruas la lingvon al pli ol mil infanoj. En Hawera la "Intermediate" (intermeza) lernejo en februaro, 1961, enkondukis Esperanton devige en kvin klasojn (97 knaboj, 92 knabinoj) sub instruisto, s-ro W. A. Caddick.

Pro tiu sukceso la lernejestro, s-ro G. H. Tunncliffe, en 1962 plivastigis la devigon al la tuta lernejo de 400 gelernantoj — la unua en Nov-Zelando faris tiun kuragan paŝon.

La Nov-Zelanda Instruista Esperanto-Asocio aranĝis dum la jaro tri 3-tagajn Esperanto-kursojn por instruistoj en Auckland (1) kaj Wellington (2), la ĉefurbo. S-ro Bertram Potts paroladis pri Esperanto al pli ol 300 studentoj de la porinstruista seminario de Wellington. Por veki intereson la NZEA ĉiumonate eldonis nacilingvan bultenon por siaj membroj kaj eksteruloj, raportante novaĵojn lokajn kaj alilandajn pri Esperanto sur la lerneja kampo. S-ino Rita Aagaard (Auckland) NZEA — reprezentante ĉe la Sofio-Kongreso transdonis la personajn (ne registarajn) salutojn de la ĉefministro (s-ro Keith Holyoake), la ĉefo de la Opozicio (s-ro A. H. Nordmeyer), la Ministro de Enlandaj Aferoj (Sir Leon Gotz), la Ministro de Edukado (s-ro W. B. Tennent), kaj la Komisaro de Nov-Zelando en Londono (Sir Thomas MacDonald), kaj la eksĉefministro (s-ro Walter Nash).

Ni fieras pri la reklamoj, kiujn ni sukcesis gajni, por altreliefigi la nov-zelandan parton de la Jarlibro (I-a Parto).

Malfrue en la jaro vizitis Nov-Zelandon s-ino Doris Worcester, el Ajabe, Japanujo, kiu paroladis pri Esperanto en multaj urboj kaj grandsukcese propagandis per intervjuoj ĉe ĵurnaloj, radio, kaj televido. Komence de la jaro UEA aprobis nian proponon, ke ni starigu tri-jaran planon, por pagi 20.000 stelojn por "Nov-Zelanda Cambio" ĉe UEA-sidejo, Roterdamo. Ĝis la fino de la jaro nia membraro jam donacis 18138 stelojn, do, mankas nur 1862 steloj antaŭ la celo.

De tempo al tempo estis eble fari paroladojn pri Esperanto sur la tereno de Rotario, turismo, virinoj, lernejoj, ktp. La UEA-delegita ĉeno tra la lando pli ol duobligis dum la jaro ĉefe pro la penado de s-ro W. Hudson King

veturante tra niaj du ĉefinsuloj. Kun plezuro nia ĉefdelegito, s-ro James T. Allan, ricevis informojn de UEA, ke nia lando gajnis unuan lokon de la 1963-a internacia konkurso. Kvankam malmulte da kluboj energie subtenis la kolektadon de poŝtmarkoj, s-ino Yvon Canty, N.Z.-kolektanto dum la foresto alilande de s-ino R. Aagaard, sukcesis ekspedi al Kopenhago almenaŭ 100.000.

En 1961 N.Z. gajnis duan lokon, en 1962 unuan. Fine de la jaro okazis kun elstara sukceso nia 29-a Esperanto-Kongreso en Wellington, kiun bonege raportis kaj fotografis la loka gazetaro. Ĵurnala artikolo antaŭ la kongreso allogis 26 lerneajn geknabojn el la ĝenerala publiko al infano-kongreseto, kiu okazis dum la kongreso, al kiuj parolis kelkaj parolantoj pri la valoro de la lingvo, literaturo, Japanujo (lumbilda), k.t.p., kune kun rektmetoda leciono.

La organizinto estis s-ro Geoffrey H. Wilson.

19) **Pollando.** Pola Esperanto-Asocio. Dum la jaro 1963 la movado en Pollando sufiĉe plifortiĝis. Nombro de membroj de PEA ĉe la fino de la jaro estis 3346. La Asocio havis 65 filiojn. La ŝtataj aŭtoritatoj plu subvencis la Asocion. Tre impona estis eldonado. Dum unu jaro estis eldonitaj kelkaj lernolibroj kun eldonnombro ĉ. 50.000 ekz. Ĝi estas rekorda cifero en historio de la pola movado. Aperis jenaj novaj lernolibroj: M. Sygnarski — Lernolibro de lingvo Esperanto (20.000), A. Pettyn — Lernolibro de la internacia lingvo (10.200), Maria Niemirow — Esperanto por ĉiuj (5.100). Krome aperis: Pekoj de l'Infaneco de Prus (eldonita de Suda Regiono de PEA), Mapo "Pollando" (financita de Ministerio por Eksterlandaj Aferoj), reeldonita vortaro pola-esp. de Guterman, lernolibro por junularo de Hodakowski (1000), vortaroj elektraj (fundamenta, maŝinaj kaj transformilaj), kelkaj skriptoj kiel helpmaterialo por kursoj. Vendosumo de libroj estis alta (315 mil zł). Oni faris interŝanĝon de libroj kun kelkaj landoj, tiamaniere obligante aĉetadon de alilandaj eldonaĵoj. Dum la jaro oni instruis E-on en ĉ. 200 kursoj kun pli ol 4.000 partoprenantoj. Krome en 87 lernejoj oni daŭrigis instruadon kiel nedeviga studobjekto kaj en la kadro de rondoj de interesiĝoj. Okazis plu konstantaj disaŭdigoj en la pola lingvo en Gdańsk

kaj Łódź. Dum la Internacia Foiro en Poznań funkciis E-o stando. En la Internacia Libro-Foiro en Varsovio estis organizita stando de Pola Esperanto-Asocio. Dum tagoj de klerigo, libro kaj gazetaro estis organizitaj en pluraj urboj en kadro de libro-foiroj specialaj standoj kun esp. libroj. Krome oni devas menciĝi sekvantajn atingojn: organizon de la vojaĝo de pli ol 400 polaj esperantistoj al la Sofia U.K., de pli ol 100 junaj esperantistoj al Junulara Kongreso en Vraca; gravajn paŝojn ĉe la ŝtataj aŭtoritatoj koncerne disvastigon de instruado de E-o en lernejoj kaj vizitojn ĉe diversaj ministerioj kaj ĉe prezidanto de Pola Akademio de Sciencoj koncerne praktikan utiligon de E-o; pluan disvastigon de la korespondanta kurso per vasta reklamo en ĉefaj semajnaj gazetoj, dank'al kio al la kurso enskribiĝis 350 novaj kursanoj; dissendadon de komunikoj al la pola gazetaro kaj pola radio kaj presigo de tiuj komunikoj en diversaj gazetoj kaj disaŭdigo de E-o programoj en Pola Radio; eldonon de flugfolioj pri eldonaĵoj kaj de seslingva flugfolio; aranĝon de la rondovojaĝo de S-ro Halbedl el Aŭstrio kaj prelegojn de aliaj eksterlandanoj; organizon de prelegvojaĝoj de partoprenantoj de Karavano de Amikeco tra Afriko kaj de s-ro Dworczyk pri vojaĝo tra Afriko kaj Azio; propagandon de E-o ĉe internaciaj kongresoj okazintaj en Varsovio inter aliaj ĉe elektristoj kaj ĉe Konsilantaro de Pac-Movado; organizon de kelkaj renkontoj de esperantistoj inter alie en Kłodzko; eldonon de 10 milionoj da alumetskatoloj kun esperantaj etiketoj (dank' al laboro de Suda Regiono de PEA); kunlaboron de la junulara sekcio (PEJ) kun skoltaro kaj organizon de seminario ĉe skoltoj, tendaro kaj instruado de E-o al skoltoj en kadro de tiel nomata akcio Banjo (Instruado de fremdaj lingvoj en Bydgoszcz Regiono). En diversaj filioj, regionoj kaj sekcioj oni povis konstati diversajn tre interesajn iniciatojn, tamen pro limigo de spaco ne estas eble menciigi ĉiujn. Generale oni povas diri, ke la filioj kaj regionoj en pasinta jaro plifortiĝis.

20) **Svedujo.** Sveda Esperanto-Federacio. La federacio havas ĉ. 1.500 membrojn, kaj laboras ĉ. 50 lokaj societoj. La junulara sekcio — Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo — daŭrigis la energian laboron en la Jaro de la

Junularo, elsendis sian specialan gazeton Kvinpinto kaj aranĝis somermezajn renkontiĝojn. Kunlabore kun la federacio la junulara sekcio anoncis pri E-o en la porjunulara gazetaro, kaj al ĉiuj petantoj ni sendis diversspecajn informojn. La federacio invitis siajn membrojn al nova instrusistemo "Adopta instruado", privata instruado de unuopuloj je konvenaj tempoj. La lokaj societoj mem aranĝas sian informan laboron. Sed flanke de la federacio estas i.a. notinde, ke 3.650 afiŝoj, flugfolioj, prospektoj ktp estis distribuitaj, 123 artikoloj kaj 438 mallongaj informoj aperis pri E en la sveda gazetaro. 1 radio-informo kaj 1 prezentado de E pere de TV estas notindaj. En la Kongreso. La landa kongreso okazis en Lund; estis i.a. speciala poŝtstampo kaj en la programo diservo en E. La urbo oficiale akceptis ĉe lunĉo. La E-distriktoj aranĝis proprajn regionajn studkonferencojn. Entute okazis 192 prelegoj antaŭ 10.100 neesperantistoj. Notindaj 2 ekspozicioj, kiujn vidis 138.000 personoj. En la jaro aperis la Sveda E-Gramatiko de Erik Carlén kaj "Ŝipestro rakontas" de F. T. Lundquist. "La Espero" (red. T. Morariu), la federacia revuo, estis aŭtomate distribuita al ĉiuj membroj, kaj aperis informa numero en septembro. "Esperanto-Nytt" kun novaĵoj informas aŭtoritatojn k.a. pri E. La oficialan revuon de la junulara sekcio "Kvinpinto" ricevas ĉiuj gejunuloj de la federacio. Ĉ. 200 svedoj partoprenis la UK-n en Sofio kaj veturis grandparte tien per luita aeroplano. Salutis por la sveda registaro direktoro Karl Söderberg. Por UK Tokio interkonsento farita inter Danujo, Finnlando, Norvegujo kaj Svedujo pri speciala, luita aeroplano trans la norda poluso. Estis farita speciala peto ĉe preskaŭ ĉiuj bibliotekoj, ke ili aĉetu E-literaturon. Okazis kolektado de libroj, gazetoj por la movado en Hindujo. La konata firmao Ytong prezentis ne nur luksan reklaman broŝuron en E sed ankaŭ por vizitantoj nacilingvan broŝuron pri la valoro de E.

21) **Svisujo.** Svisa Esperanto-Societo nombras 305 membrojn kaj 44 subtenantajn amikojn. Ekzistas Tiĉina Ligo kaj lokaj Grupoj en Basel, Bern, Biel, Genève, Herisau, Langenthal, Lausanne, La Chaux-de-Fonds, Luzern, Neuchâtel, St. Gallen, Vevey kaj Zürich. Kelkaj de tiuj

grupoj eldonas propran multobligitan informilon. Diversaj unuiĝoj organizis kursojn kies sukcesoj apenaŭ estas menciindaj. La UEA-afiŝon kune kun librokatalogo la societo dissendis al ĉ 300 libristoj, petante ilin, elpendigi la varbilon en la montrofenestroj. Dum la vintromonatoj ni ree propagandis la perpoŝtajn kursojn kaj havis sufiĉe bonan sukceson. Vendigis ĉ 100 ekzempleroj. En aŭtuno la kursmendintoj estis invititaj al membriĝo. Sekve de tio aniĝis 15 gejunuloj. Tia varba kampanjo estos daŭrigata. Tiun jaron la societo ree kreis novan varbilon, nome alumetujetojn. Disdonigis 10.000 ekz. Kune kun vorarlbergaj esperantistoj, SES organizis por la unua fojo 3-landan renkontiĝon en Bregenz (5-6.10.63). Partoprenis pli ol 120 personoj. Ion similan ni antaŭvidas por la venonta jaro. Plia simila renkontiĝo okazis en Tiĉino (9.6.63, Lugano). Organizis ĝin la Tiĉina Ligo. Alvenis ĉ 110 personoj. Tiuokaze Radio Sviszera Italiana disaŭdigis intervjuon kun s-roj Azzi, Barbellini-Amidei, Sasselli kaj Carlevaro. La societa organo "Svisa Espero" aperis 6 fojojn samkiel la bulteno de nia informa fako "Esperanto-Information". Valoraj estas la 4 posemajnaj disaŭdigoj en internacia lingvo de la Svisa Kurtonda Radio. Menciinde estas, ke ĉijare aperis la 2-a eldono de la libro "Ĉe la sanktaj akvoj" de J. C. Heer kies eldonanto estas nia societo. Plian fojon ankaŭ eldonigis la Svisa Esperanto-Kalendaro. Speciale menciinda estas la laboro de la fakaj organizaĵoj. La edukistaro ĉiam agas kaj precipe okupiĝas pri la lerneja kampanjo en la Juraso regiono. Okazis grava manifestacio honore al la tro frue forpasintaj profesoro Edmond Privat kaj Charles Ecabert, kiuj ambaŭ estis meritplenaj batalantoj por nia idealo. Dum la jarfino la EES en kunlaboro kun la junularo ree organizis sukcesplenan skiferian semajnon en Adelboden. Dum la februara monato okazis prelegoj en Bellinzona kaj Como pri Edmond Privat. Kiel en la antaŭaj jaroj ĉiam tre aktivas la Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. Ĝi daŭrigis la ĉiuspecan informadon per eldono de diversaj varbiloj, informas la kolegaron per 11 elmontrofenestretoj en stacidomoj kaj personaraj ripozejoj, ofte ŝanĝante la elmontraĵon, publikigis artikolojn en la fervojistaj sindikataj fakgazetoj aŭ aliaj porfervojistaj periodaĵoj kaj forvendas daŭre german-

kaj franclingvajn korespondajn kursojn. Precipe dum la lastaj monatoj la societo atente sekvis la evoluon de la lingva problemo ĉe la Internacia Asocio de la Fervojistaj Kontraŭalkoholuloj (IEAV) kaj aktive subtenis la konkretan proponon enkonduki Esperanton kiel kongresan lingvon ĉe tiu societo. Dum la tuta jaro SAEF paradis kaj aranĝis por interesitoj feriojn en Cervia (Italujo), kunlaboris en aranĝoj de la dua Tiĉina Regiona Renkontiĝo en Lugano, organizis internacian feriosemajnon, kie kuniĝis 45 partoprenintoj el 8 landoj, okazigis 5 prelegojn pri Esperanto kaj la Homaj Rajtoj.

## II. NEALIGINTA LANDA ASOCIO

1) **Koreo.** Korea Esperanto-Asocio, en Norda Koreo lastjare estis sufiĉe aktiva. La Korea Radio Pjongjeng disaŭdigis regule en Esperanto. Krome en la Norda Koreo okazis esperantaj kursoj. En Suda Koreo ankoraŭ ne ekzistas oficiala tutlanda asocio, sed estas organizita en Taegu Korea Esperanto-Instituto. Ĉ. 50 koreaj esperantistoj kunlaboras kun la Instituto. Por plivigliki kaj progresigi nian movadon oni komencis reorganizi kaj reordigi KEJ-n sub la gvido de s-ro Taekeng KIM ekde septembro. S-ro Hengwi Hong, vicprezidanto de KEI, profesoro pri Esperanto en Chunggu Univ. (Kie oni instruas Esperanton kiel oficiala nedeviga leciono ekde 1950 kaj kies prezidanto, s-ro Haechung Choi (Prez. de KEI) estas fervora Esperantisto) publikigis Esperanto-Tezon korealingve en Profesora Disertacio de Chunggu Universitato, kiu estas eldonata unufojon jare. Krome ekzistas Korea Junula Esperanto-Asocio, kies gvidanto estas s-ro Taekeng KIM (Sekretario de KEI). KJEA havas 50 geanojn kaj pozitive kaj aktive agadas por Nia Movado, de post sia fondiĝo 1953. En Junio organizigis Koncentra Cirklo-Rondo de gimnaziaj geesperantistoj en TAEGU. S-ro Chilhyan KIM fariĝis la prezidanto de K.C.R., kaj s-ro Sangkuk KIM, la organizinto de K.C.R. restas kiel honora membro de K.C.R. Sub la aŭspicio de KJEA okazis Diskutkunveno, Distra Vespero, Pilkoludo-Konkurso kaj ekskurso al Templo Hae In per omnibuso por gejunuloj. 1963 estis la jaro rompi ĝisnunan stagnadon en Korea Esperanto-Movado. Dank'al persista kaj peniga

laborado de s-ro Taekeng KIM, aganto por Esperanto en Koreo, ni sukcesis enkonduki Esperanton en lernejojn kiel oficiala leciono ekde la lernojaroj 1963-1964. Dum unua semestro (Marto-Aŭgusto 1963) s-ro Taekeng KIM instruis Esperanton kiel oficiala sed nedeviga leciono de Specialaj Agadoj por Studentoj en Keong Puk Gimnazio (55 p.), en Keong Puk Knabina Gimnazio (57 p.), Chunggu Liceo (35 p.) kaj en Chunggu Teknika Kolegio (80 p.). Krome prof. Hengvi Hong instruas Esperanto-lecionon regule en Chunggu Univ. (jaude kaj Vendrede 2 horojn ĉiusemajne 200 gestudentoj). Krome okazas aliaj kursoj en diversaj lernejoj. En Oktobro s-ro Hengwi Hong vojaĝis al Japanio invitive partopreni la 50-an Kongreson de Japanaj Esperantistoj kaj revenis post trimonata restado. Kvankam li ne povis partopreni la Kongreson pro lia malfrua atingo, li kontribuis multe por Esperanto-Movado en Japanio. Li fariĝis la unua persono, kiu invitive partoprenis Esperanto-Kongreson en alilando kiel koreano. Tio donis multan stimulon kaj interesigon al junaj esperantistoj.

En Novembro okazis Ekspozicio en Taegu, okaze de la 15a datreveno de la fondiĝo de Chunggu Universitato. Ni ricevis la subvencion je 18,000 won (ĉ. \$ 140.00) por la Ekspozicio de Chunggu Univ. La Ekspozicio daŭris nur du tagojn, sed vizitis pli ol 500 rigardantoj. Poste la ekspozicio rondiradis tra la 6 gimnazioj — Keong Puk Gimn., Keong Puk Knabina Gimn., Taegu Gimn., Taegu Knabina Gimn., Ke Seong Gimn., kaj Uon Hŭa Knabina Gimnazio-, kaj entute vizitanto estis pli ol 2.000 personoj.

En Decembro s-ro Taekeng KIM sukcesis enigi duoblan Esperanto-kovrilon en la libro, "MAJSTROVERKARO DE KOREAJ MODERNAJ POETOJ", kiun eldonis nun agantaj 38 gepoetoj kolektinte siajn ĉefverkojn kaj honoris sian majstron dediĉante ĝin al li, Prof. Poeto Eunsang Lee, kiu ĵus fariĝis Esperantisto. La libro estas valora monumento en Korea Literatura Historio, kaj kune kun ĝi Esperanto aperis plivalora ĉe publiko.

La informado pri Esperanto estis sufiĉe vasta. Okazis radioelsendoj pri Esperanto. Estis 4 foje aperigita artikolo pri Esperanto en Taegu ĉiutaga ĵurnalo, kaj unufoje en monata gazeto Jeo Uon- (Virina Ĝardeno). Dum Aprilo aperis dufoje longa artikolo verkita de s-ro Taekeng KIM.

En Julio Taegu Ĉiutaga ĵurnalo aperigis sian tutpaĝan Esperanto-artikolon kun fotoj kaj statistikoj. En Decembro aperis en sama ĵurnalo la artikolo pri la vizito de Prof. Hong al Japanio pere de Esperanto. En Semebro numero de monata gazeto por virinoj aperis eseo de prof. Hengwi HONG pri Esperanto kaj Virino.

En "Lilio", la bulteno de Keong Puk Knabina Gimnazio, aperis detalaj informoj pri Esperanto, kaj ankaŭ en "Keong Mek", la bulteno de Keong Puk Gimnazio aperis longa artikolo (16 paĝa). "Kial ni bezonas Internacian Lingvon Esperanton?" verkita de gimnaziano. En "Chunggu Chunchu", la trionmonata bulteno de Chunggu Univ. aperis Esperanto-Rubriko, "Verda Monteto" sub la redaktado de s-ro Taekeng KIM, kaj daŭre aperadis dum 4 monatoj.

### III. FAKAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ

**Internacia Scienca Asocio Esperantista.** Kvankam dum la jaro 1963 la krizo de Scienca Revuo ne tute ĉesis, tamen ĝi alproksimiĝis al sia fino. Nome en tiu jaro aperis kompleta Vol. 13 de la revuo (por la jaro 1962) kaj duono de la Vol. 14 (la jaro 1963) estis transdonita al la presejo. Bulteno de ISAE aperis nur en 2 numeroj (6, 7), ĉar la bezono ne estis multe pli granda. Tio sufiĉis por la kontakto kun la membroj, kies nombro — pro la antaŭa krizo — ankoraŭ ne superis 400. La membroj en pli grandaj landoj estis organizitaj en la filioj de ISAE, kiuj ekzistis en: Francujo, Germanujo (okc.), Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Novzelando kaj Sovetunio. Per Vol. 13 de Scienca Revuo, ISAE donis al siaj membroj kaj al aliaj esperantistoj bonajn diskutmaterialojn por agado en neesperantistaj sciencaj rondoj kaj por preparado de la Dua Internacia Konferenco (pri lingva problemoj en scienco), ĉar ĉi tiu volumo enhavis ĝuste la materialojn de la unua tia konferenco, okazinta dum la 47-a Univ. Kongreso en Kopenhago.

La sekcioj de ISAE. Kun la jam ekzistantaj sekcioj (studenta, arkitekto-konstruista, ornitologia, medicina) ne estas starigita ankoraŭ sufiĉe firma kaj konstanta kontakto. Intertempe, dum la Universala Kongreso en Sofio, estis fonditaj tri novaj sekcioj: filologia, matematiko-



fizika kaj astronomi-geodezia. Ili troviĝas ankoraŭ en la komenca organiza stato, sed ilia kreo alproksimigas la realigon de la nova organizformo de ISAE (inaŭgurita en ĝia lasta Statuto): fariĝi nur la komuna tegmento por diversaj fakaj societoj.

Terminologia Centro daŭre kunlaborigas multajn fakulojn al la komuna terminologia laboro. Preskaŭ 150 ricevitaj kaj tiom da forsenditaj leteroj estas grava signo pri la frekvento en ĉi tiu laboro de la Centro. Dum 1963-a jaro la T.C. multobligis du partojn de la Elektroteknika Vortaro (por du grupoj) kaj aliaj du estas preparitaj por transdono al la diskuto antaŭ la multobligo.

La jarkunveno de ISAE kaj la publika kunveno (kun la temo: Kiel esperantistoj-nefakuloj povas helpi al scienco?) okazis dum la 48-a kongreso en Sofio. La jarkunveno decidis, interalie, plifortigi la aktivecon por la Internacia Universitato, transiri al unu salajrata helpanto en la sekretario kaj daŭrigi la kontaktojn starigitajn dum la kongreso kun la "Mondfederacio de sciencaj laboristoj". La celo de la kontaktoj kun M.F.S.L. estos kunlaboro por la komunaj internaciaj celoj, pro kio oni serĉos la formon aliĝi al tiu organizaĵo kaj klopodi ke la organo "Scienca Mondo" ekaperu ankaŭ en esperanto.

**Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj.** Komence de la jaro 1964 la Asocio havas 122 membrojn en 29 landoj (kompare kun 98 el 28 landoj en 1963), el kiuj proksimume trideco estas juraj fakdelegitoj de UEA. La Plenuma Komitato daŭrigis la laboron de la antaŭaj jaroj por pliuuniversaligi la Asocion kaj tiel doni al la membroj pli grandajn eblecojn interrilati por siaj fakaj kaj profesiaj celoj. Dum la UK en Sofio la Ĉefkunveno reelektis la ĝisnunan Plenuman Komitaton (Prez. Prof. D-ro Ivo Lapenna; Vic-Prez. D-ro Herrmann, Germanujo, kaj S-ro Sakowicz, Pollando; Sekretario-Kasisto S-ro Sven Ziegler, Danlando), sed alektis kiel sekretarion por Orienta Eŭropo S-ron Dimiter Dimov el Bulgario, kiu jam rezultigis gravan kreskon de la membraro en tiuj landoj. Antaŭ publiko de 35 juristoj el 10 landoj estis faritaj raportoj pri la Koncepto de la Proprieto kaj ĝiaj Ĉefaj Limigoj en Pollando kaj Bulgario. La kunvenon ĉestis reprezentanto de la Ministerio de Eksteraj Aferoj de Bulgario. La Asocio donas daŭran atenton al la fakter-

minologia laboro, kiu komencas iri pli glate ol antaŭe.

#### IV. FAKAJ ASOCIOJ KUNLABORANTAJ

1) **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.** La Ligo konsistas el asocioj en la jenaj 15 landoj: Aŭstralio, Aŭstrujo, Britujo, Bulgarujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svedlando, Svislando kaj Usono. Krom la Ligo havas oficialajn reprezentantojn en Algerio, Belgujo, Danlando, Hispanujo, Hungarujo, Israelo, Maroko kaj Urugvajo. La oficiala organo de la Ligo estas "Edukado Internacia". En la jaro 1963 aperis 8 numeroj, raportante pri lernejoj kaj instruistaj aferoj kaj precipe funkciis kiel helpilo en la ligo laboro. En la kongreso de Sofio okazis la komitata kunveno. Okaze de tiu kongreso la ministro por instruado de Bulgarujo invitis la ILEI-anojn al festena akcepto, en kiu li faris prelegon pri la instrusistemo de sia lando. Dum la Kongreso okazis du pedagogiaj kunvenoj. La Ligo kunlaboris kun "Grajnoj en Vento" kaj "Geonkloj esperantistoj".

2) **Internacia Naturista Organizo Esperantista (INOE).** En 1963 nia ĉefa tasko estis ankoraŭ la disvolviĝo de nia organizo kaj ĝia interna konstruo. Je la fino de decembro ni havis 203 membrojn, do ĉirkaŭ 30% pli ol antaŭ unu jaro. Ni havis landajn reprezentantojn en 21 landoj kaj membrojn en 30. Fondiĝis grupo de la Pariza Regiono. En 1963 la laboro estis farata de S-ro Massemin, kiu disdonis kvarlingvan (Esp. angl. fran. germ.) flugfolion kaj gvidis kurson kun 15 gelernantoj. La naturista nacilingva gazetaro daŭre akceptis informojn kaj artikolojn pri Esperanto kaj INOE. Ni tamen, pro manko da tempo ne plene uzis ĉiujn eblecojn tiurilate. Laŭ la firma, kvankam ankoraŭ nova kutimo, kelkaj membroj de INOE feris kune en naturista restadejo. En 1963, tiu kunveneto okazis ĉe la agrabla Hafnes-lago en Aŭstrujo. Nia revuo "Naturista Vivo" aperis regule, 4-foje en la jaro, kiel antaŭplanite. La Internacia Naturista Federacio INF agnoskis la Internacian Naturistan Organizon Esperantistan — INOE — kiel sian laborgrupon por la Internacia Lingvo.



3) **Internacia Societo de Arkitektoj** — kaj Konstruistoj — Esperantistoj (mallongigo: I.S.A.K.E.). Fine de la jaro 1963 la societo havis 137 deklaritajn membrojn el 27 diversaj landoj de la mondo, de kiuj 59 estas arkitektoj, 27 estas konstruistoj kaj 51 estas profesiuloj el parencaj fakoj. Ekzistas du kluboj de la societo, unu en Kraków, Pollando kun 15 membroj el tiu urbo, kaj la alia en Praha, Ĉeĥoslovakujo kun 11 membroj el la tuta lando. La societo estas memstara faka sekcio de arkitektoj- kaj konstruistoj-esperantistoj en la kadro de Internacia Scienca Asocio Esperantista, kun kiu ĝi kunlaboras. Dum la pasinta periodo, la societo okupiĝis kun la problemoj de konkreta kaj utila, praktika kaj vera faka kunlaboro pere de lingvo internacia - esperanto. La ĉefaj problemoj estis: la apliko de lingvo internacia en arkitekturo kaj konstrufakoj, verko kaj prilaboro de arkitektura kaj konstrufakaj terminaroj, interŝanĝoj de fakaj manlibroj, revuoj kaj spertoj, konstrufakaj artikoloj, prelegoj kaj vizitoj al konstrufabrikejoj, institutoj kaj konstruaĵoj diversaj. La terminaraj laboroj estis verkitaj en hispana, pola, ĉeĥa kaj serbakroata lingvoj, sed neniu manuskripto estis kontrolita kaj preparita por presi ĝin. Tre grava interesiĝo pri la agado de la societo ekzistas inter la junaj arkitektoj kaj konstrufakuloj. Pro tio, la personaj kontaktoj inter ĉiuj arkitektoj kaj konstruistoj estas vere gravaj kaj utilaj. Post laborkonferenco de la societo en Sofia, Bulgarujo, la bulgara s-ano Aleksander Kurtev, arkitekto el Sofia, montris dum la promenado al partoprenantoj de laborkonferenco la gravajn kaj interesajn konstruaĵojn kaj monumentojn de bulgara ĉefurbo.

4) **Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj (LIBE)**. Dum 1962 la membraro de LIBE ne vere kreskis, sed ĝojiga fakto estas, ke montriĝis anoj el novaj landoj kiel Vietnamio kaj Indonezio. Oficialajn Reprezentantojn ni havas en 25 landoj, sed izolajn Membrojn kaj legantojn de nia regule aperanta monata organo ni posedas en multe pli da landoj. La agado de LIBE dum la lasta jaro konsistis ĉefe el plenumado de internaj taskoj konforme al niaj celoj. Unuan atenton ni dediĉis al la regula publikigo de "Esperanta Ligilo", kiu ne nur estas nia oficiala Organo, sed la universala gazeto por la Blinduloj kaj unu el la

plej malnovaj gazetoj en Esperantujo, ĉar en 1964 ni solenos ĝian 60-an datrevenon. Ĝi aperas kun daŭra financa kaj morala subteno de diversaj Blindulorganizaj (neesperantistaj) el ĉ. 15 landoj. Surbaze de la Rezolucio alprenita de la Konferenco de Blinduledukistoj en Hannover (1962) LIBE, rekte kaj pere de siaj landaj sekcioj provis varbi novajn blindulojn al nia Internacia Lingvo. En pluraj lernejoj okazis oficialaj aŭ duon-oficialaj, devigaj aŭ libervolaj E-kursoj. Aliparte diversaj landaj sekcioj havas viglajn perkorespondajn kursojn foje apogataj per magnetofonaj bendoj. La 33-a Internacia Kongreso de Blindaj E-istoj okazis kun la U.K. en Sofio, kaj la 34-a okazos same kun la U.K. en Hago. Dank' al la kunlaboro de kelkaj niaj landaj sekcioj kaj al la helpo de neesperantistaj blindulpresejoj kaj — asocioj, ni povis pligrandigi la liston de la E-libroj akireblaj en brajla skribo; ni notu i.a. "Vivo de Zamenhof" kaj "Karlo" de Ed. PRIVAT. La bultenoj de niaj landaj Sekcioj ankaŭ aperis pli-malpli regule, same kiel la sonbendoj de niaj "parolantaj gazetoj". Funkciis ankaŭ la "pagservo" dank' al kiu niaj anoj povas pli facile aĉeti librojn aŭ aparatojn en aliaj landoj. La E-fakoj de brajlaj pruntbibliotekoj pliriĉiĝis je kelkaj verkoj, same kiel la E-fakoj de sonlibraj servoj.

5) **Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO)**. En 1963 jaro STELO festis sian kvinjaran datrevenon de fondiĝo. En tiu jaro (1963) STELO organizis bonegan arangon t.n. "STELO-semajnon" en Primošten (Jugoslavio) kiun partoprenis pli ol kvindek gestudentoj el tri kontinentoj. Interalie partoprenis la arangon prezidanto de Japana Esperantista Ligo Studenta s-ano Nobuyuki Shoji. En la jaro 1964 okazos "II-a STELO-semajno" en pola kuraĵloko Ciechocinek apud Bydgoszcz. Oni organizis ekspozician agadon pri STELO kvinjara starigis magnetofonan sonbendan komunikadon inter STELO-kluboĵoj, oni anoncis literaturan konkurson por atlerneja junularo. Ankaŭ estas antaŭvidata en 1964 tn. Fakkunveno por pridiskuti la temon "Agado de internaciaj kaj landaj studentaj organizaĵoj". Tiu fakkunveno okazos en Hago kaj tie ankaŭ okazos tn. Jarkunveno de STELO, kie okazos novaj elektoj por nova estraro, resumo de agado kaj

nova jara laborplano. STELO plu restas sekcio de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) kaj ne ŝanĝos sian rilaton al ISAE.

6) **Universala Medicina Esperanto-Asocio (UMEA).** Dum la jaro 1963 la anaro de la Asocio kreskis en unuopaj landoj, sed ne ĉiuj medicinistoj povis aliĝi oficiale pro neebleco enpagi la kotizojn. En multaj landoj agas la landaj perantoj de UMEA. Sekcioj de medicinistoj esperantistoj estas en Bulgarujo, Japanio, Jugoslavio, Pollando kaj Sovetunio. Ankoraŭ en organizado estas sekcioj kiuj grupigas la kuracistojn de la sama specialeco la Sekcio de oftalmologoj kaj la sekcio de neŭrologoj kaj psikiatroj. Farmacistoj kiuj apartenis al UMEA, formis la apartan asocion, organizitan fare de Redakcio de faka revuo "Farmacia" en Italio, "Internacian Farmaciistan Esperantistan Asocion". En pli grandaj urboj ekzistas la rondetoj de kuracistoj, kiuj ofte kunvenas kaj kunlaboras kun la Estraro de UMEA. La gvidanto de "Medicina Terminologia Centro" pretigis jam medicinajn terminojn por "Plena Ilustrita Vortaro". Kune kun la kunlaborantoj de MTC li prilaboras la esperantlingvan suplementon al seslingva ampleksa medicina vortaro. En kelke da fakaj revuoj estis resumataj esperantlingve la artikoloj kaj referatoj ("Acta Orthopédica Belgica", "Polio Revue-Paris", "Journal de médecine de Lyon", "Nevraze" — Italio, "Farmacia" — Italio, "Tohoku Seilai Saigai Geha Kiya - Ĥirurgia Revuo en Japanio). Post la 48-a Kongreso aperis en kelkaj fakaj revuoj mallongaj sciigoj pri la kunveno de UMEA. En aprila nr 1963 de la "Germana Esperanto-Revuo" estis presita la informartikolo pri UMEA. Delegito por medicino en Germanujo Dro Besold enpagis la presadon de 200 depresaĵoj de tiu artikolo. Ili estis dissenditaj de Sekretariino al medicinistoj en diversaj landoj. Samtempe estis senditaj Bultenoj de ISAE en kiuj aperis informoj pri UMEA kaj pri projektoj de kunlaboro inter UMEA kaj ISAE. Dum la 48-a U. Kongreso en Sofio okazis la 7-an de aŭgusto, la jarkunveno de UMEA, sub la prezidado de Doc Dro Salnikov, ĉe honora ĉeesto de Prof. D-ro Hideo Yagi. Partoprenis ĝin 93 medicinistoj el 12 landoj. Dum la organiza parto de la kunveno estis preparolataj gravaj problemoj de UMEA:

la kialoj de neregula aperado de "Medicina Revuo", la kunlaboro kun ISAE, la plivigligo de korespondado inter medicinistoj. Oni decidis komenci la kunlaboradon kun Internacia Ruĝa Kruco. Dum faka parto de la kunveno estis traigitaj 9 fakaj referatoj je la temo "Novaĵoj en la medicino". La partoprenintoj de dumkongresa kunveno estis akceptitaj en Ministerio de Sanprotektado en Bulgario. Ili aŭskultis la referaton pri organizado kaj progresoj de Sanservo en tiu lando.

## V. NENEŬTRALAJ ASOCIOJ KUNLABORANTOJ

1) **Kristana Esperantista Ligo Internacia.** En 1963 K.E.L.I. vigle daŭrigis sian laboron. La landaj sekcioj organizis esp. kursojn kaj kunvenojn. La internacia kongreso de KELI okazis en Graz (Aŭstrujo). Ĝi estis vizitata de 130 personoj, kaj la temo de la kongreso estis: "Kontraŭ la rezignacio". La specialaj aktivecoj de KELI estas la misiaj fakoj, unu en Nederlando kaj unu en Svedujo, kiuj forsendas bibliojn kaj kristanan literaturon al esperantistoj, kiuj petas tion. En Svedujo ankaŭ ekzistas Biblia studkurso en Esperanto. En Nederlando okazas ĉiumonate radio-elsendo "La Evangelio en Esperanto". En Helsinki (Finnlando) okazis en 1963 la 4-a Plenkunveno de la Lutera Mondfederacio, kiu estis vizitata de 5000 personoj. Okazis tie Diservoj en diversaj lingvoj, ankaŭ en Esperanto. La prezidanto de nia finna KELI-sekcio, Past. T. Ilmari Haapalainen aranĝis tion kaj Past. R. Hoppe el Germanujo gvidis la Diservon. Li havis ankaŭ la okazon, paroladi en pluraj kunvenoj kun traduko de Past. Haapalainen. En Svislando oni ekprovis starigi Internacian Evangelian Radiosendilon (EPI), kiu promesis ankaŭ uzi Esperanton se montriĝas sufiĉe da interesiĝo por tio.

2) **Kvakera Esperantista Societo.** K.E.S. havas 152 membrojn en 24 landoj kun reprezentantoj en 11 landoj. Ni aparte ĝojas pri niaj grupoj en mezeŭropaj landoj. Konstante daŭras nia kontakto kun membroj per leteroj, renkontiĝoj kaj vizitoj, kaj ankaŭ per nia gazeto "Kvakera Esperantisto". En la jaro 1963 ni eldonis novan libreton "Sovaĝaj Plumoj" de L. Violet Hodgkin. Ĝi estas Kvakera

historio por infanoj tradukita de Nina Curtis. Reklamado en Esperantaj gazetoj produktis bonan vendon de "La Esenco de la Kvakerismo" de Gerald Hibbert (traduko de Marek Waysblum), kaj de "William Penn". Ĉi tiu lasta estas prelego de Edmond Privat prezentita dum la Internacia Somera Universitato ĉe la Universala Kongreso de Esperanto en Mainz, Germanujo, 1958. La temo "Unuiĝintaj Ŝtatoj de Eŭropo" estas aktuala en la hodiaŭo. Per la disvastigo de nia literaturo tra la tuta mondo ni deziras interesi homojn pri la kvakera maniero de vivo. Ni okazigos kvakeran kunvenon dum Pentekosto 1964 en Bridlington, Anglujo, en la kadro de la 48a Brita Kongreso de Esperanto.

Kompilis Z. Czuba, estrarano pri Landaĵ, Fakaj kaj Neneŭtralaj Asocioj.

## ENHAVO

Antaŭparolo . . . . .	3
Rezolucio . . . . .	4
50-a Universala Kongreso de Esperanto, Tokio . . . . .	5
L. L. Zamenhof . . . . .	6
Komitato de UEA . . . . .	18
Estraro de UEA . . . . .	21
Honora Patrona Komitato . . . . .	22
Centro de Esploro kaj Dokumentado . . . . .	23
Serva Centro de UEA . . . . .	23
UEA-kotizoj 1965 . . . . .	26
Financoj . . . . .	32
Internacia Esperanto-Muzeo Wien . . . . .	42
Raporto de la Estraro	
I Enkonduko . . . . .	43
II Generalaĵoj . . . . .	44
III Administrado . . . . .	45
IV Financoj . . . . .	50
V Periodaĵoj . . . . .	53
VI Kongresoj . . . . .	55
VII Eksteraj rilatoj . . . . .	58
VIII Informado . . . . .	64
IX Lernejoj . . . . .	70
X Specialaj kulturaj aktivecoj . . . . .	74
XI Instituto por Esperanto en komerco kaj industrio . . . . .	78
XII Junularo . . . . .	80
XIII Generala trarigardo . . . . .	81
XIV Konkludo . . . . .	84
Raporto de CED . . . . .	86
Aldono pri landaj, fakaj k.a. asocioj . . . . .	93






**ANTAŬ LA 50-A UNIVERSALA KONGRESO**

menu ĉi tiun luksan gvidilon tra la japana vivo!

400 nomoj aŭ terminoj, tola bindaĵo kun kartona skatolo, riĉa ilustro. Prezo: 18 gld (72 st). Sola vendraĵo ekster Japanujo: U.E.A.



11048

